

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



Julio
2007

Nº7



La slovakon kongreson gastigis Martin, kie antaŭ cent jaroj aperis la unua E-libro por slovakoj (*Petro Balaž, pĝ. 6*)



La plej sukcesaj lernantoj ricevis pokalojn kaj diplomojn en la tradicia konkurso "Kostrena 2007" (*Emil Hrvatin, pĝ. 8*)



Instruistoj kaj lernantoj el kelkaj landoj kunvenis en Bulgario kadre de la projekto AKEL (*Genovaitè Liepinia, pĝ. 8*)



Luanda Cozetti estas unu el la artistoj, kiuj foje kantas en Esperanto (*Flo Martorell, pĝ. 19*)

Sur la kovrilo: Junaj MKRanoj (*Vanja Radovanović, pĝ. 8*)

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №7 (153)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 750 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2007, №7 (153).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 25 июня 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Plibonigi la mondon per Esperanto

Renato Corsetti respondas

Post sesjara deĵoro, Renato Corsetti en Jokohamo forlasos la postenon de la prezidanto de UEA. Malgraŭ granda labor-ŝarĝo antaŭ la transdono de la stafeto, li afable konsentis respondi kelkajn demandojn, inter kiuj estas ankaŭ demandoj de membroj de nia Yahoo-grupo *La Balta Ondo*.

Kiujn atingojn kaj malatingojn, laŭ via opinio, vi havis kiel prezidanto de UEA?

Nu, estas malfacile mem juĝi objektivajn atingojn kaj malatingojn. Mi kredas, ke la ĉefa atingo estas, ke mi komprenigis al la homoj, ke la vortoj *informado* kaj *instruado* estas esencaj por tiuj, kiuj volas nomi sin aktivaj esperantistoj. La dua atingo estas la enirigo de UEA en la retan mondon. (Mi volas doni al vi anekdoton por klarigi la situacion: la unuaj retaj paĝoj de UEA estis faritaj sekrete kunlabore inter mia 14-jara filo kaj Kalle Knii-vilä.) La tria atingo estas la remalfermo de dialogo inter UEA kaj la esperantistoj ĉie en la mondo, sendepende de tio, ĉu ili pagis kotizon aŭ ne.

La ĉefa malatingo estas, ke mi ne sukcesis ŝanĝi la situacion de la movado. Ni estis malmultaj kaj ni restas malmultaj. Mi ne sukcesis ŝanĝi la movadon kaj fari el ĝi maŝinon por produkti novajn esperantistojn. Tro multaj — ĉefe en Eŭropo, sed vere en la tuta ekonomie forta mondo — preferas stultumi inter esperantistoj kaj debati pri ĉio debatebla kaj la plej kreemaj emas produkti servojn por esperantistoj, sed ne fari ion por disvastigi Esperanton. Tion mi ne sukcesis ŝanĝi.

Eble dum via oficperiodo estis pli da streĉiteco ol dum la oficperiodoj de ĉiuj viaj antaŭuloj post la t.n. Hamburga Puĉo en 1974. Ekzemple, baldaŭ post via unua prezidantiĝo kvin gvidaj oficistoj de la Centra Oficejo demisiis. Kiel eblis, ke Buller kaj Zapelli tamen poste revenis dum vi plu prezidantis?

Nu, mi vere pli interesiĝas pri la Esperanto-movado ĝenerale ol pri UEA kiel organizaĵo. Mi kredas ke UEA kiel organizaĵo rajtas ekzisti nur ĉar ĝi servas Esperanton. Des malpli mia atento celas la Centran Oficejon de UEA, kiu estas nemalhavebla praktika centro, sed ne povas transpreni la funkciojn de aktivuloj tra la mondo rilate al Esperanto.

La streĉoj ŝuldiĝis ĉefe al malsamaj

taksoj pri la graveco de la Centra Oficejo rilate al la tuta movado. Kaj mi ne komprenis tiam, kial Osmo Buller kaj Pasquale Zapelli foriris. Mi mem estis tute preta daŭrigi la kunlaboron kun ili kaj tion mi diris al ili plurfoje tiam. Do, mi estis tute kontenta kiam ili revenis, kaj la kunlaboro kun ili ne povus esti pli bona, ol ĝi estas.

Kiun rolon CO havas?

Ekzistas la Centra Oficejo, kiu dro-nas sub amaso da taskoj (revuo, jarlibro, UK, ktp.), kaj ekzistas la movado, la aktivaj esperantistoj, kiuj estas plej supere reprezentataj de la komitato de UEA kaj de la estraro.

Estas eraro kredi, ke la Centra Oficejo estas ĉio, kaj ke ĉio dependas de ĝi. La esencaj aferoj de Esperanto, la proponado de ĝi al la homoj kaj la instruado de ĝi dependas de la estraro, de la komitato kaj de la aktivuloj tra la landoj. Se Esperanto ne disvastiĝas en Indonezio, ne kulpigu la Centran Oficejon, kulpigu la estraron. Se la revuo venas kun malfruo, kulpigu la Centran Oficejon kaj ne la estraron. Mi mem multe pli ploras pro tio, ke Esperanto ne disvastiĝas en Indonezio ol pro la malfruo de la revuo (kiu bonŝance nun ne malfruas).

Al tiuj, kiuj diras, ke ni bezonas oficiston, kiu okupiĝu pri Esperanto en la fakoj, por ke Esperanto disvastiĝu en la fakan mondon, mi diras: “oficismo estas la maljunula malsano de esperantismo”. Ni bezonas entuziasmajn kaj libervolvajn laborantojn por Esperanto en la faka mondo. Sen tio oficisto utilas al nenio.

Subtenado de la Brusela Komunikadcentro estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de la enormaj deficitoj de UEA en 2002 kaj 2003 (respektive: 57 kaj 49 mil eŭroj). Ĉu tiu investo valoris, kaj ĉu ankaŭ estonte UEA dediĉu rimedojn al agado en Bruselo?

Nu, tiu investo valoris, por pravi ankoraŭfoje tion, kion mi diris en aliaj okazoj: Esperanto ne estos akceptata de la Eŭropa Komunumo ne pro manko de oficistoj en Bruselo, sed pro manko de



vigla Esperanto-movado en Eŭropo. Oficistoj povas fari multon kaj ili faris multon en Bruselo, sed se mankas esperantistoj en Britujo aŭ Slovenujo aŭ Grekujo, oficistoj ne povas kompensi tiun mankon. Tion, bedaŭrinde ankaŭ la nuna estraro de EEU ne tute komprenas. EEU devus decidi, ke ĝi estas civitana movado, kaj devas antaŭeniri laŭ la metodoj de civitanaj movadoj: grandaj prem-kampanjoj de la civitanoj al la politikistoj.

Komence de via mandato, rezulte de la grandioza aktivado de la UEA-komisiito Hans Bakker, UEA havis altan prestiĝon en Afriko. Sed poste UEA translokis sian Afrikan Oficejon en Beninon el Togolando, rompante kun Gbeglo Koffi kaj lia stabo. Fine de via mandato vi ricevas riproĉojn pro “koloniismo”, “imperiismo” ktp el diverslandaj afrikaj aktivuloj. Kiel vi komentarias la regreson de la reputacio de UEA en Afriko dum via prezidanteco?

La kunlaboro inter Hans Bakker kaj mi pri Afriko datas de la komenco de la 1980aj jaroj. Hans faris mirindan laboron. La problemoj komenciĝis, kiam Hans decidis, ke Esperanto estas ne nur lingvo sed ankaŭ maniero helpi malsantajn afrikanojn iom satigi. Li persone multe helpis. Ĉi tiu aspekto laŭgrade super-regis komence de ĉi tiu jardeko kaj ĉiam pli superregis, ĝis la momento, kiam la afrikaj “aktivuloj” decidis, ke venis la momento sendependiĝi, tio estas ricevi la monon de UEA kaj elspezi ĝin laŭ propraj decidoj kaj celoj. Kiam UEA decidis ke la oficejo en Lomeo estu vera oficejo dependanta de la Direktoro de UEA, ili diris: “Ne, dankon! Ni plue volas la monon, sed ni ne volas labori laŭ la ordonoj kaj sub la kontrolo de la Direktoro de UEA”.

Mi iom ŝanĝas la faktojn, por ke oni

✉ pĝ. 4

ne rekonu precizajn homojn, sed tiuj akuzantoj estas tiom kontraŭimperiismaj ke antaŭ iom da tempo unu petis de mi privatan stipendion por studi en Pollando, alia petis invitojn al UK por neesperantistoj, kiujn li intencis reven-di al dezirantoj veni al Eŭropo, kaj tria bezonis kudromaŝinon por la kuzino de sia edzino.

Bonvolu komenti ankaŭ la vortojn de Andreas Künzli pri UEA kaj pri la Esperanta Civito en la junia Ondo.

Mi konsentas kun Andreas. Mi ĉiam diris: la problemoj estas ne la Civito, la problemoj estas ni. La Civito estas fenomeno momenta, kiu havas personajn kaŭzojn. Eĉ ne indas paroli pri la afero. La vera problemoj estas la ideoj de la Civito: ni utiligu Esperanton, ni flegu ĝin (eĉ ni kreu propran ŝtaton, kio estas efektive nur granda ludo), kaj ni ne surprenu taskojn rilate al portado de Esperanto al la ekstera mondo. La angla jam venkis, kaj ni zorgu pri nia niĉo, ni ludu inter ni per nia literaturo. Tiuj ideoj estas multe pli disvastigataj inter esperantistoj en la ekonomie fortaj landoj ol oni imagas, kaj ili respondecas pri multaj el la nunaj problemoj de la movado. Mi tute bone komprenas, ke tia sinteno havas kaŭzon. Neniu ŝatas senti sin formiko luktanta kontraŭ elefanto, kaj do preferas imagi sin leono en la formikejo, sed nia tasko estas esti formikoj kaj lukti kontraŭ elefantoj. Ni ŝuldas tion al la tuta glora historio de nia movado, kiu trairis unu el la plej sangaj jarcentoj de la homara historio kaj daŭre luktis kaj pretervivis. Se ni lasas la lukton, ni perfidas la homojn, kiuj donis siajn suferojn kaj foje sian vivon por Esperanto por ne paroli pri la idealoj de Zamenhof.

Ekster UEA kaj la Civito estas pluraj aktivadoj realaj kaj virtualaj,

gazetaj kaj retaj. Kiuj el ili estas la plej atentindaj?..

Multaj el ili estas. La retaj kursaroj, ekzemple, estas monstro de tio, kiel la juna generacio kapablis adapti siajn agad-manierojn al la nuna mondo. "Lernu.net", NESTO, la kurso de Carlos Pereira kaj sennombraj aliaj lokaj kaj regionaj kursaroj meritas nian senkondiĉan laŭdon.

Mi estis unu el tiuj, kiuj subtenis *Ĝangalon* malgraŭ tio, ke ĝiaj ambicioj estis tro grandaj rilate al la Esperanto-merkato. Mi vidas multajn aliajn interesajn iniciatojn, kiel vian gazeton aŭ *Liberan Folion*. Aliflanke la "merkato" estas ankoraŭ tro malgranda. Ni bezonas grandigi ĝin por la avantaĝo de ĉiuj.

Ĉu vi opinias, ke la de vi alstrebita partnereco kun "lingvodefendantoj" alportis aŭ alportos por Esperanto fruktojn?

Mi ne vidas multajn konkretajn fruktojn ĝis nun. Estis kelkaj kongresaj paroladoj interesaj kaj voj-montraj, sed ili ne trovis vojantojn inter la esperantistoj. Mi mem estas konvinkita, ke prezenti Esperanton kiel ilon por defendi la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj lingvoj estas la sola pravigo por ĝi en la nuna mondo. Mi celas iun moralan econ pro kiu homoj povus aŭ devus iĝi esperantistoj. *Pasporta Servo* kaj similaj personaj avantaĝoj ne estas io por mi. Mi apartenas al tiuj, kiuj volas plibonigi la mondon per Esperanto kaj mi serĉas samspecanojn.

Tuj post la elekto, vi nomis vin duonserce prezidanto de ĉiuj esperantistoj. Ĉu vi sentis vin tia?

Iusence jes. Se oni preteratentas la Civiton (sed ankaŭ kun ili mi daŭre dialogis en afabla maniero) kaj kelkajn individuojn, kiuj ne interesiĝas pri la

progreso de Esperanto, mi vere ĉiutage ĝis nun ricevis petojn, komunikojn, bondezirojn de esperantistoj el la tuta mondo. La plej varmaj estas miaj brazilaj kvazaŭsamlandanoj, sed ankaŭ multaj aliaj. Ekzemple, hieraŭ mi estis en kontakto kun rusoj kiuj havas problemojn pri vizo al Japanujo, kun afrikanoj kiuj devas organizi seminarion en Benino, kun nepalanoj kiuj devas iri al Vjetnamujo, kun slovenoj, ktp. ktp.

De kie venas, spite la abundecon de konfliktoj en Esperantujo, via toleremo kaj pacamo? Ĉu vi ne estas iel seniluziigita dum via prezidanteco?

Konfliktoj abundas en Esperantujo kiel en ĉiu grupo tre malgranda kaj kiu ne atentis pri la granda celo. Homoj ne nur ne pretas morti pro siaj idealoj (kiel tiuj en pluraj landoj dum la pasinta jarcento), aŭ nur suferi la malsaton pro Esperanto (pensu pri tiu instruistino, pri kiu parolis Zamenhof, kiu preferis aĉeti lernolibrojn por la lernantoj ol manĝaĵojn por si), sed eĉ ne fari la plej malgrandan oferon. La vero estas, ke ili pensas pri si pli ol pri Esperanto. Se oni pensas pri Esperanto, oni faras oferojn kaj ne kverelas. Mi konas dekojn da trankvilaj homoj, kiuj neniam estas intervuataj de niaj ĵurnalistoj, neniam aperigas siajn fotojn en la reto, neniam kandidatas por io ajn, sed ĉiam respondas entuziasme, kiam mi petas ilin sendi vortaron al homo ie ajn en la mondo. Mi sentas min tre malgranda kompare kun ili ne kompare kun niaj retorikantoj, kies preteco finiĝas tuj post la vendado de paroloj.

Mi seniluziigis nur de tempo al tempo, kiam homoj, kiuj laŭte promesis, ke ili faros ion, ne faris tion. Sed tio ne estas vere granda seniluziigo. Mi pli kaj pli estis kontenta pri la faroj de la farintoj.

Neevitebla demando: pri viaj planoj post la prezidantiĝo...

Mi verŝajne daŭre okupiĝos pri la itala movado. En UEA mi volas fari la plej malfacilan aferon, kiu ekzistas nun: provi helpi la disvastigon de Esperanto en la arablingvaj landoj. Vi scias pri la problemoj: Zamenhof estis judo, internacieco ne estas araba koncepto, ktp.

Via konsilo unufraza al la venontaj prezidanto kaj estraro?..

Bondezirojn! La situacio estas malfacila, sed daŭrigu esence laŭ la instruoj kaj la ekzemplo de Zamenhof, kiu estis pli granda revoluciulo ol ni, kvankam li ne konis la distingon inter "linux" kaj "unix". Tio ne estas grava. Gravas la celoj de la agado.

La estonta Estraro de UEA

La Elekta Komisiono proponis al la Komitato de UEA elekti la sekvan Estraron por la laborperiodo 2007–2010, kondiĉe ke ĉiuj ok havos la statuson de komitatano (ĉu A, ĉu B aŭ C) je la momento de elekto, kun indiko pri preferaj agadkampoj:

Prezidanto **Probal Dasgupto**.

Vicprezidantoj: **Ranieri Clerici** (anstataŭanto de la prezidanto, homaj kaj lingvaj rajtoj, plivastigo de la tegmenta funkcio de UEA, modernigo de la funkciado de la organizo, stimulado de debatoj, planadoj); **Claude Nourmont** (kultura kaj kongresaj agadoj, daŭripova evoluigo de la Asocio).

Ĝenerala sekretario: **Barbara Pietrzak**.

Estraranoj: **Marija Beloŝević** (faka agado, informado, servoj al lokaj kluboj, naciaj asocioj, fakaj asocioj, individuaj membroj); **Loes Demmendaal** (financo-administrado); **Hori Jasuo** (landa agado, edukado, kulturo); **José A. Vergara** (strategio, lingvopolitiko, movada evoluo, scienca esplorado pri Esperanto).



Jokohamo atendas vin

Clay Magalhães, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, vizitis Japanion kaj laboris 1–4 jun kun la Landa Kongresa Komitato de la 92a UK en Jokohamo. Li vizitis la urbodomon, la kongresejon, la koncertejoj n.k.a. kaj nete diskutis pri diversaj preparlaboroj. Kun li LKK povis multe akceli la preparadon.

La urbo Jokohamo decidis subvencii la UK-on per 1.100.000 enoj (6875 eŭroj). Ĉi tiu sumo, pli alta ol ordinariaj subvencioj de la urbo, estos utiligebla por reklamiloj/informiloj pri la UK kaj la publikaj programeroj, kaj ankaŭ por la urbestra akcepto, kiu okazos 9 aŭg en la urbodomo.

Syôzi Keiko

UEA: printempo en la somero

Kun pli ol 90 vizitantoj el 15 landoj la Centra Oficejo de UEA spertis neku-time multnombre vizitatan “printempan” Malferman Tagon sabaton, la 2an de junio.

La ĉefa gasto estis Claude Piron, kiu elektis iom provokan temon por sia prelego: “Ĉiuj neesperantistoj estas afaziuloj”. Lucas Vignoli Reis, vojaĝanta “ataŝeo” de Brazila Esperantista Junulara Organizo, prelegis kun sonaj kaj bildaj specimenoj pri la muziko de sia lando. Yves Nevelsteen kaj Petro Balaĉ enkondukis la publikon en la retan enciklopedion *Vikipedio*. Kiu volis konatiĝi kun *Vikipedio* pli profunde, povis poste ĉeesti praktikan demonstiron kiel uzi kaj kunredakti ĝin. La tutan tagon estis ankaŭ montrataj Esperanto-filmoj. Surpriza aldono al la programo estis la flamenka versio de *La espero* fare de Solo.

La plej furora libro (17 ekz-oj venditaj) dum la Tago estis la ĵus aperinta *Afero de espero: Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko* de Heidi Goes, kiun la aŭtorino mem prezentis kadre de la programo. Entute la Libro-servo vendis librojn kaj aliajn varojn por 2054 eŭroj.

GK UEA

Nova prezidanto de nia Akademio

Prof. Geraldo Mattos lasos la prezidon de la Akademio de Esperanto: li retiriĝas post tri mandatoj, kvankam li rajtus rekandidatiĝi. Lin anstataŭos prof. John Wells, unusola kandidato.

Poeto kaj lingvisto, Geraldo Mattos transprenis la prezidon de d-ro Werner Bormann en 1998.

La nova prezidanto, fonetikisto, delonge membras sed neniam vere aktivis en la Akademio: li eĉ riskis aŭtomatan ekzigon pro pli ol tri nepartoprenoj en sinsekvaj internaj konsultigoj, laŭ la statuto. Fine pensiulo en kariba insulo, li havos pli da libera tempo por la Akademio, kie la ceteraj estraranoj restos la samaj (do Probal Dasgupta estos kaj prezidanto de UEA kaj vicprezidanto de AdE).

En la Akademio kunestas diversaj lingvofilozofioj: ekzemple, la volapukeca hiperskemismo de Renato Corsetti (kiu konsideras esperanton nur aŭ ĉefe planlingvo) distancas de la raŭmismo koncepto pri identigilo por la esperanta popolo, ĉe Perla Martinelli. La kolizio inter pensoskoloj estas natura, en ĉiu respektinda akademio.

HeKo

Bonzoj lernas nian lingvon

15 maj usona esperantisto Dennis Kieffe ekinstruis Esperanton en la budhisma templo Duobao en Zhejiang-provinco en orienta Ĉinio por trideko da lernantoj inkluzive de bonzoj kaj ordinariaj nereliguloj.

Dennis Kieffe intense instruis dum tri semajnoj per sia lernolibro *Baza Esperanta Kurso* (BEK). Lin helpis aliaj esperantistoj, inkluzive de franca esperantisto Michell. Miaohui, estro de la templo kaj fama esperantisto disvastiganta budhismon per Esperanto, filmis erojn de la kurso kaj metis ilin en la interreton.

BEK estas la unua nivelo de la Esperanto-Kursa Sistemo, kompleta kursaro por komencantoj de Esperanto. Ĝi estas multe pli longa ol la kutima kurso por komencantoj, kaj daŭras inter 60 kaj 100 horoj por plenkreskaj eŭroplingvanoj, kaj inter 300 kaj 500 horoj por alilingvanoj.

Post la kurso Dennis Kieffe vizitis Pekinon por trejni instruistojn de Esperanto en la Pekina Bazo por Esperanto-instruado al Infanoj. Ĝi estis fondita de la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) en infanĝardeno en oktobro 2006.

Espero.com.cn

“Ne estu sola”

30 maj – 3 jun 2007 Seĉ (Ĉeĥio) gastigis la 5an kongreson de la Asocio de Esperantistaj Handikapitoj (AEH). Plejparte partoprenis ĉeĥoj, sed ses pojoj kaj germanoj kreis internacian etoson.

Post la malfermo la prezidantino de AEH Jarmila Rýznarová bonvenigis ĉiujn, aparte la urbestron de Seĉ Lubomír Schmitt, kiu en salutvortoj esprimis sian ĝojon, ke ni decidis kongresi en ĉarma loko de la Fera Montaro kaj ĉe la fama akvovalbaraĵo.

La prezidantino en sia enkonduka parolo menciis la situacion de AEH kaj deklaris sian intencion transdoni la gvidadon de la asocio al pli juna homo. Ŝi menciis la kongresan temon “Ne estu sola”, pri kiu dum la plua tago la ĉeestantoj aŭskultos prelegon.

Post la 4a kongreso (2002) la agado de AEH estis konstanta kaj diligenta. En ĉi tiu kvinjara periodo oni aranĝis naŭ lingvajn seminariojn en Skokovy kaj 37 lingvajn antaŭtagmezojn en Prago kaj Pardubice. La asocia gazeto *Informilo* kun la suplemento *Antaŭen* aperadas regule. La asocio nun nombras 210 membrojn, plejparte en Ĉeĥio, sed 50 el ili estas eksterlandanoj el 18 landoj. La enspezoj kovris la kurantajn materiajn elspezojn kaj renovigon de malnova komputilo kun programa ekipo, videokamero kaj kopiilo. La kongreso elektis novan komitaton de AEH kun Pavel Nechvíle kiel la nova prezidanto.

La programo enhavis kelkajn prelegojn, videofilmojn, muzikajn vesperojn kaj ekskursojn. Regiona televido venis por filmi la kongreson kaj intervjui kelkajn kongresanojn. La saman tagon ni povis vidi bonan raportaĵon en ĈT 1 kaj ĈT 24.

Jary, Johr, PaN

La Civito internaciĝas

Esperanto-Federacio de Niĝerio (EFEN) estas la dua landa asocio de UEA (post la Meksika), kiu petis aliĝon al la Pakto por la Esperanta Civito. En EFEN membras centoj da individuoj kaj deko da lokaj kluboj. Preskaŭ neniu situas en la norda parto de la lando, influata de islama kulturo kaj kun haŭsa etno. La plejmulto de la esperantistoj vivas aŭ devenas el la sudorientaj regionoj, kun kristana kulturo kaj ibo-etno. La Forumo pritraktos la aliĝpeton en sia plej baldaŭa sesio.

HeKo

Jubilea kongreso en la urbo de la unua slovaka lernolibro

La lastan majan semajnfino en la urbo Martin okazis Kongreso de Slovaka Esperanta Federacio (SKEF). Martin gastigis la Kongreson, ĉar ĝuste tie antaŭ 100 jaroj aperis la unua lernolibro de Esperanto por slovakoj. (Temas pri *Fundamento de Esperanto*, kiun eldonis en 1907 slovako, d-ro Albert Škarvan kun rusoj Nikolaj Evstifejev, kiel *Základy mezinárodnej reči esperanto od Dra Zamenhofa*.)

La urbaj instancoj ege helpis realigi la Kongreson, kiun partoprenis pli ol 60 homoj el kvin landoj. Dank' al malavara subteno estis eldonitaj 10 mil informiloj pri Esperanto, estis faksimile reeldonita la unua slovaka Esperanto-lernolibro (en speciala “kolektantoversio”), ĉiuj urbaj muzeoj estis senpagaj dum la Kongreso por ĝiaj ĉeestintoj, samkiel salono kun refreŝigo por la “Mezeŭropa Konsultigo”, kiu okazis dum la unua tago de la Kongreso. Ni kore dankas al la tuta urbo Martin, precipe al la urbestro Andrej Hrnčiar kaj al kulturestro Alexander Zacharides. Estas atentinde, ke Martin nun kandidatiĝas por “Eŭropa urbo de kulturo” en 2013, kaj oni proponis al SKEF, kaze de sukcesa elekto, pripensi okazigon de granda Esperanta aranĝo en tiu jaro (UK, IJK, EEU-kongreso...)

En la tradiciaj “Mezeŭropaj Konsultigoj” reprezentantoj de Landaj Asocioj de mezeŭropaj landoj interŝanĝis siajn spertojn, planojn kaj informis pri la agado en siaj landoj. Ĉi-jare la diskutadon unufoje ĉeestis junularaj reprezentantoj, estraranoj de Landaj Sekcioj de TEJO. La Konsultigon ĉeestis entute 13 reprezentantoj el Slovakio, Ĉeĥio, Pollando, Hungario kaj Aŭstrio. EEU estis reprezentita de Georgo Handzlik, kiu ankaŭ komencis la muzikan parton de la Kongreso vespere per horo da siaj kantoj.

La laborprogramo komenciĝis sabate matene, post la solena malfermo. Ankorau antaŭtagmeze estis elektita la nova estraro de SKEF: Rastislav Šarišský (prezidanto), Stano Marček (viceprezidanto), kaj Alexandra Vališová (kasistino). La malnova estraro adiaŭe transdonis du premiojn por la agado en 2006: la Esperantisto de la Jaro iĝis Lubomír Fajth pro longa laborado en kaj por la Esperanto-arkivo en Plevník, kaj por la Ago de la Jaro estis honorita Liptova Esperanto-Klubo (pro la okazigo de la instruista seminario omaĝe al Miloslav Rybín).

Dum la sekva programo prezentigis muzike Milan Dočekal el la fama grupo *TEAM*, kiu kantis Esperante kaj slovake. Estis prezentitaj tri novaj libroj: la menciita reeldono de la unua lernolibro por slovakoj, *100 gravaj personoj de la slovaka Esperantomovado* de Ján Vajs (Esperanto-slovaka eldono), kaj dulingva *Ŝanco por feliĉo* de P.Bosmans, tradukita en la slovakon de Eduard Tvarožek. Sekvis prelegoj pri la 100-jariĝo de Esperanto en Slovakio, vizito de la Muzeo de Martin Benka kaj de Nacia tombejo en kiu estas entombigitaj kelkaj gravaj slovakaj esperantistoj. La vespera programo konsistis el la muzika prezento de slovakaj popolkantoj (parte kantitaj en Esperanto), kvizo pri la Esperanto-movado, kulturaj prezentoj kaj tombolo.

Dimanĉe estis prezentitaj novaj lerniloj de Stano Marček, sekvis prelego pri internaciigo de komputilaj programoj far Viliam Búr. Fine, la nova prezidanto prezentis prioritatojn kaj agad-planon por la proksima tri-jara periodo. La lasta programero estis ekskurso en la subĉiela muzeo en Jahodníky.

Petro Baláž

Parto de la internacia kongresanaro en Hamburgo (Fotis Jürgen Wulff)



Esperanto kiel ŝanco por EU

“Esperanto helpus plifortigi la Eŭropan identecon”. Tiel opinias d-ro Seán Ó Riain en sia prelego en la Germana Esperanto-Kongreso. La irlanda ambasadoro en Bruselo kaj prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio estas konvinkita, ke ĝuste lige kun la multlingveco en la Eŭropa Unio pli da justeco en la lingva politiko donus pli da efikeco. Helpe de Esperanto oni povus malpliigi la komplikajn kaj temporoban traduklaboron en la institucioj de la EU. Tiamaniere oni povus treege rapidigi la decidprocezojn.

La prelego de Ó Riain estis unu de la kulminaj punktoj en la ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazis de la 25a ĝis la 28a de majo en Hamburgo. La fokusa temo de la kongreso estis *Hamburgo — la kreskanta urbo*. La 181 partoprenantoj, inter ili gastoj el Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Ĉeĥujo, Danlando, Nederlando, Britujo, Pollando, Hungarujo, Latvujo, Kazahujo, Ukrainujo, Bulgarujo kaj Meksiko, sin okupis i.a. pri la urba evoluo el ekonomia vidpunkto (d-ro Werner Bormann, Hamburgo) kaj pri la problemo de “urbo-ŝrumpado” (Peter Kuhnel, Berlino). Ekskursoj kompletigis ilian bildon, i.a. en la estiĝanta “havenurbon” (Hafen-City) kaj al la renversa flanko de la kreskanta urbo, la vivmedio de la senhejmuloj.

Riĉa kulturprogramo kompletigis la aranĝon, ekz. koncerto de la fama nederlanda grupo *Kajto* kaj la kantado de la “Shanty”-koruso *Henneberg-Bühne Poppenbittel*.

La plej grava punkto en la tagordo de la GEA-membrokunveno estis la elekto de nova estraro la 27an de majo. D-ro Rudolf Fischer, lingvisto kaj privata docento pri medicina informadiko kaj biometrio el Nordwalde apud Munster, estis elektita kiel prezidanto, Andreas Emmerich kiel viceprezidanto kaj Pit Hauge kiel trezoristo. Wolfgang Bohr, Andreas Diemel, d-ro Jorg Gersonde, Sebastian Kirf, Christof Krick kaj d-ro Rainer Kurz kiel kromaj estraranoj.

Dum la Germana Esperanto-Kongreso ankaŭ estis prezentata la *Granda Vortaro Germana-Esperanto* de Erich-Dieter Krause, kiu aperis la 21an de majo en la eldonejo *Helmut Buske* en Hamburgo. Ĝi estas la plej ampleksa dulingva vortaro de Esperanto en la mondo kun 1679 paĝoj kaj pli ol 160 mil kapvortoj kaj parolturnoj.

Thomas Sandner

Sukcesa Kongreso en Francio

Aparte sukcese pasis la kongreso de Esperanto en Francio, en la ĉarma rodan-alpa urbeto Bourg-en-Bresse, de la 26a ĝis 28a de majo. Kunvenis 174 kongresanoj el Francio, Hispanio (Katalunio), Luksemburgio, Germanio, Rumanio, Svedio, Irano.

La Kongreso markis inaŭgura prelego de Rodica Todor pri Rumanio, perskajpa interŝanĝo kun ĉinaj samideanoj, inaŭguro de Arbo de Paco, sukcesa aŭkcio kies kolektita monsumo (750 EUR) helpas al du Esperanto-projektoj. Okazis ĝeneralaj asembleoj de Rodan-alpa Federacio, de GEE (Groupe des Enseignants Espérantophones), franca sekcio de ILEI ktp.

En la riĉa kultura programo estis:

— sukcesa koncerto de la kataluna ensemblo *Kaj Tiel Plu*, kiu ravis multajn ĉeestantojn, inter kiuj kelkajn neesperantistojn, en plena MJC (Domo de Junuloj kaj Kulturo); unu el la kantoj estis ludata kune kun Martin Wiese kaj *Dobla Unu*.

— prezo de la tre baldaŭ aperonta K-disko de *Dobla Unu*, kiu bonege prezentis ankaŭ la koncertajn vesperojn,

— koncerto de Martin Wiese, kantisto de la iam furora grupo *Persone*, akustike.

Funkciis abunda libroservo, malsoifiga kaj satiga trinkejo deĵorata de Kotopo-uloj k.m.a.

La Kongreso kompreneble ankaŭ konsistis el multaj laborkunsidoj: du Komitatkunsidoj (KK) kaj la Ĝenerala Asembleo de Esperanto-France, laborgrupoj pri kotiz-sistemo kaj pri interfederacia kunlaboro. En la dua KK, post elekto de novaj komitatoj reprezentantaj la individuajn membrojn de UFE, estis elektita nova estraro:

Prezidanto: Bruno Flochon; kaskisto: Julia Hedoux; ĝenerala sekretario: Aleks Kadar; vic-sekretariino: Armelle Piolat; vic-prezidanto pri informado: François Bartsch; vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj: Cyrille Hurstel; estrarano pri federacioj: Xavier Dewidehem; estraranino pri kulturaj aferoj: Claude Nourmont.

Venontjare la kongreso ne estos nur kongreso de Esperanto-France, ĝi estos nacia renkontiĝo inter-asocia, arigonta, same kiel en Boulogne-sur-Mer (2005) Esperanto-France kaj SAT-Amikaro kaj la francajn fervojistojn kaj aliajn landajn E-asociojn. Okazos ĝi 22–25 mar ĉe Mediteranea maro, en Martigues.

Aleks Kadar



Samia Harir el Tuluzo, komitatano de Esperanto-France, reprezentanta la regionan Federacion Sud-Pireneo, ĉe la riĉa kongresa libroservo. (Fotis Alex Kadar)

Krakovo: ne vintre, sed somere

Kvankam la Esperantaj Tagoj de Krakovo tradicie okazas en decembro, la 24aj Tagoj okazis dum la unua junia semajnfino.

Partoprenis 66 poloj kaj gastoj el Ĉeĥio kaj Niĝerio. Vendrede volontuloj ekskursis en Las Wolski, nomata “verdaj pulmoj de Krakovo”. Tio estis bona okazo por konkurso pri nomoj de arboj kaj bestoj (venkis Zbigniew Duda el Krzeszowice).

Diskuto pri eblecoj kaj bezonoj de Esperanto-movado, kiun gvidis Tomasz Chmielik kaj Kazimierz Leja, okupis antaŭtagmezajn sabatajn horojn. La etoson feliĉe ŝanĝis la koruso *Kamea* sub gvidado de Zbigniew Warmuz, kaj Andrzej Feuer kun spritaj versaĵetoj.

Al la kultura programo kontribuis ankaŭ junulara kant-ensemblo el Modlnica, ĉi-jara venkinto de la vojevodiana konkurso “pli proksime al la mondo”. Andrzej Kołpanowicz kun helpo de lumbildoj rakontis pri sia pentroarto, kaj 15-jara Joachim Kołpanowicz ludis klasikan gitaron. Lidia Ligęza kortuŝis aŭskultantaron per novaj rakontetoj. Konataj krakovaj muzikistoj — Irena Urbanska kaj Lesław Lic — pruvis, ke melodioj de Lehar kaj Strauss estas neforgeseblaj.

La dimanĉo komenciĝis per vizito en la muzeo de Stanisław Wyspiański, pri kiu detale parolis Lidia Ligęza, iama vicedirektorino de ĉi tiu muzeo. La 24ajn Tagojn finis sankta meso, celebrata en la plej malnova krakova preĝejo de S-ta Adalberto.

Andrzej Kołpanowicz

Ĉieleniro 2007 en Metz

Dum la Spirita Internacia Renkontiĝo pri la psalmoj, kiun ni organizis 17–20 maj en Metz (Francio), ni partoprenis vendredan diservon de ŝabato.

“Ni” estis grupo de 20 romkatolikaj esperantistoj el Francio kaj Germanio; inter ni estis tri pastroj. La Granda Rabeno de nia regiono tre varme bonvenigis nin kaj kaptis la okazon por publike diri kelkajn vortojn al la fideluloj pri Esperanto kaj Zamenhof. Vendrede matene estis prezentita la enhavo de la diservo, preĝata entute en la hebrea. (Antaŭ du jaroj kaj duono, ni organizis ion kune kun la juda komunumo de mia urbo: tiam Mikaelo Bronŝtejn prezentis biografion de Zamenhof kaj kantis Esperante, jide kaj ruse.)

Dum tiu kvartaga Spirita Renkontiĝo, ni partoprenis ankaŭ diservon en Karmela Monaĥejo. Partoprenantoj havis dulingvan (Eo-Fr) dokumenton kun la tuta teksto de la dua Vespuro de Ĉieleniro. Fine de la diservo, preĝata en la franca, laŭ propono de fratino Agnès, priorino de la monaĥejo, ni preĝis *Patronian* ankaŭ en Esperanto. Kaj p. Héroux (oficiala eklezia konsilanto de la francaj romkatolikaj esperantistoj) benis la tutan asembleon.

Kompleta programo de la renkontiĝo estas en la reto: www.breviero.org/chieliro2007/

Bruno Masala

Paraiba Valo, la 68a Renkonto

La urbo Barra Mansa (Rio-de-Ĵaneiro) 17 jun akceptis la 68an Esperanto-Renkonton de Paraiba Valo en kultura institucio *Grebal*, kies prezidanto, José Flemming, ĉeestis.

Post la malfermo, Carlos Pettinati prelegis pri ekologio kun projekciado de bildoj. Sekvis prezo de historio de la Esperanto-movado en la regiono (Alberto Flores), Guto da Gramatiko (Paulo Sergio Viana), kaj informoj pri la proksimiĝanta Brazilo Kongreso.

Intertempe, junulo Adriano Prado prezentis dinamikajn ludojn por spertigi la grupon pri ekologia plantado kaj pri la neceso grupe kunlabori por atingi bonajn rezultojn. Posttagmeze, oni kantis amuzajn kanzonojn, spektis parton de la filmo *Gerda Malaperis* kaj debatis pri la maniero renovigi kaj revigligi niajn renkontojn. Dum la tuta renkonto funkciis libroservo kaj elementa kurso. La 69a Renkonto okazos en Caraguatatuba (San-Paŭlo) 30 sep 2007.

Paulo Sergio Viana

Pokalo Kostrena 2007

Konkurso *Pokalo Kostrena 2007* pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj okazis ĉi jare en kroata marborda urbeto Kostrena (apud Rijeka) 25–27 maj 2007.

La konkurso por elementaj lernejoj estis la sesa, kaj la konkurso por mezaj lernejoj estis la dua. La konkursojn, kiujn KEL kaj Esperanto-Societo Rijeka okazigis en la skolta restadejo *Esperanto Domo*, partoprenis 21 lernantoj el ses elementaj kaj tri mezaj lernejoj el Zagreb, Sveti Križ Začretje, Dubrava Vrbovečka, Rijeka kaj Sesvete.

Samtempe kaj samloke Kroatia Esperanto-Junulara Asocio kaj Esperanto-Societo Rijeka organizis Junularan Renkontiĝon kun amuzaj vesperaj programoj kaj bonega etoso. Post la konkursoj la partoprenantoj ekskursis al turisma urbeto Opatija. Tempo sufiĉis por ludado, promenado apud la maro kaj banado.

La rezulto de la konkurso

Kategorio A (komencantoj)

1. Nikolina Gegić, Elementa Lernejo (E.L.) *Retkovec*, Zagreb
2. Veronika Brnabić, E.L. *Zrinski*, Zagreb
3. Dominik Radelić, E.L. *Dragutin Tadijanović*, Zagreb

Kategorio B (progresantoj)

1. Dora Hoelbling, E. L. *Mladost*, Zagreb
2. Monika Dabo, E.L. *Mladost*, Zagreb

La tria premio ne estas atribuita.

Mezlernejoj

1. Anđela Kanjuo, Kemio-grafika Lernejo Rijeka kaj Drago Ilišinović, Meza Lernejo Sesvete
 3. Dobriela Avramović, Konstruista Lernejo por Industrio kaj Metio Rijeka
- Pokalon Kostrena 2007* por la plej bona lernejo gajnis Elementa Lernejo *Mladost*, Zagreb.

La plej sukcesaj lernantoj kaj lernejo estas premiitaj per pokaloj kaj diplomoj. Ĉiu partoprenanto ricevis libron *Triopo Terura* de kroata verkistino Antoaneta Klobučar.

La organizantoj premiis per medaloj la plej junan konkursanton Valerija Neduhal (lernejo el Dubrave Vrbovečka) kaj la plej sukcesan konkursanton Dora Hoelbling.

La organizantoj intencas ripeti la konkurson sekvont-jare kaj bonvenigas lernantojn el eksterlando.

Emil Hrvatin



Kostreno 2007: premiitoj
(Fotis Boris Di Costanzo)

En montkabanoj kun infanoj

11–13 maj en montkabano Andrejev dom na Slemenu (Slovenio) okazis la kvina Familia MontKabana Renkontiĝo (MKR) kun 18 partoprenantoj el Hungario, Kroatio kaj Slovenio.

La celo de ĉi tiu tradicia aranĝo estis pasigi agrablan tempon en naturo en Esperanto-etoso. Denove renkontiĝis malnovaj amikoj plenkreskaj kaj junaj, denove ni ludis kaj ne mankis migrado tra bela arbara ĉirkaŭaĵo de la MKRejo.

La infanoj ludis kun ligna ludtrajno, kies relo okupis du tablojn. Ankaŭ la ekskurso en fermita minejo ĉe Mezica rilatis al trajnoj, ĉar partoprenantoj vizitis aron da subteraj tuneloj per malgranda minista trajno. Veturado per ĝi estis neforgesebla sperto! Ni pririgardis la ilojn, kiujn ministoj uzis inter mezepoko kaj nuntempo, kaj aŭskultis rakontojn de la gvidisto, kiu mem laboris en la minejo dum tridek jaroj.

Do, la celo estis plenumita; la infanoj kaj la gepatroj amuziĝis kaj ripozis.

Vanja Radovanović

46 instruantoj lernis Esperanton

Dum la tuta printempa semestro en la Vilna Pedagogia Universitato (Litovio) funkciis baza kurso de Esperanto, kiel libere elektebla stud-objekto. En la lecionoj, kiuj okazis unu fojon semajne, oni studis la lingvon kaj konatiĝis kun ties historio kaj aplikado.

Post kvarmonata studado 46 estontaj pedagogoj sukcese finis la kurson kaj ricevis du “kreditojn”. La kurso estos registrita en iliaj diplomoj fine de la universitataj studoj. Daŭriga kurso estos organizita ĉi-aŭtune.

Gediminas Degėsys

Alternativa Komunikado daŭras

Esperanto-instruistoj en Bulgario, Italio, Britio kaj Hispanio efektivas Socrates-Comenius lernejan projekton AKEL: Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj por konstrui la mondkoncepton de junuloj en Eŭropo.

Al la projekto aliĝis ankaŭ Litovio. Tri lernantinoj el distrikto Joniškis kaj ilia instruistino Genovaitė Liepinia partoprenis en AKEL-2, okazinta 15–22 apr en mezlernejo Canko Cerkovski en Polski Trambes (Bulgario) kun la temo “Kutimoj kaj tradicioj, aŭ kiamaniere festas mia popolo”.

Ĉiu lerneja teamo montris *Power-Pointan* prezentaĵon pri la temo, kontribuis por la komuna ekspozicio, partoprenis koncerton en la urba kulturdomo. Eseoj de gelernantoj estas kolektitaj por eldono. La bulgara lernejo prezentis por la partoprenantoj Paskan spektaklon en Esperanto.

Dum la semajno ni interkomunikis, vizitis la plej belajn lokojn en Bulgario: monaĥejon de Rila, ĉefurbon Sofio, belajn urbojn Pleven, Trojan, impresajn muzeojn, estis oficiale akceptitaj en la urbodomo de Polski Trambes kaj en la regiona centro Veli-ko Tarnovo.

Genovaitė Liepinia

Esperanto kaj mondĉivitaneco

Neregistara organizo Afrika Centro Mondĉivitaneco (ACM) okazigis en Benino sian unuan seminarion por la neesperantistoj “Esperanto kaj Mondĉivitaneco”.

12–13 maj 2007 en Fontaine de Vie kunvenis 22 partoprenintoj, inkluzive de ses togolandaj rifuĝintoj. Tri afrikaj esperantistoj kungvidis la seminarion. Zinkke Kodjo Benoit, eksoficisto de la Afrika Oficejo de UEA (AO), rakontis la historion de Esperanto helpe de François Hounsounou. Tiu lasta kun Francis Agbenou, nuna oficisto de AO, respondecis pri Esperanto-kurso, por kiu materialon disponigis Raoul Hounaké (ĉefoficisto de AO).

La prezidanto de ACM klarigis, kio estas mondĉivitaneco kaj emfazis, uzante la materialon disponigitan de Gerhard Hirschmann, kial estas necese ligi mondĉivitancon al Esperanto, kaj respondis plurajn demandojn. La vojaĝkosto de la rifuĝintoj, la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj de ĉiuj, kaj materialo por la partoprenintoj estis sub la respondeco de ACM.

François Hounsounou
prezidanto de ACM

La Pelplina demando: “Ĉu valoras okupiĝi pri Esperanto?”

Granda risiko estis organizi *samloke* E-renkontiĝon du monatojn antaŭ grava Kongreso. Tamen unu el organizantoj de la Ekumena Esperanto-Kongreso en Pelplin (Pollando, 21–28 jul), s-ino Jadwiga Wasiuk, riskis kaj sukcesis. Al Pelplino por la tradicia printempa renkontiĝo ĉi-maje venis 60 geesperantistoj el Pollando, Germanio, Ĉinio, Senegalio kaj Kamerunio.

“Ĉu valoras okupiĝi pri Esperanto?” estis la temo de la laborprogramo de la 7a Printempa Renkontiĝo. Siajn opiniojn prezentis Roman Dobrzyński, prezidanto de PEA Stanisław Mandrak, kaj alilandaj gastoj. Sed plej interese diris juna esperantistino, kiu bedaŭris, ke ŝi tro malfrue eklernis Esperanton, kiu por ŝi estas tre riĉa sperto.

Per Esperanto la ĉina futbalo iras al la mondo

12 jun en la ĉina urbo Fuĝoŭo (Fúzhōu), ĉefurbo de la provinco Fuĝjano (Fújiàn), okazis oficiala inaŭguro de nova futbal-klubo *C.D. Tortosa* omaĝe al la kataluna teamo *Club Deportivo Tortosa*. Temas pri la dua ĉina teamo kun la sama nomo, ĉar 20 okt 2006 en Kantono (Guangzhou) fondiĝis samnoma sport-klubo, kiel rezulto de la interrilatoj inter la kataluna teamo kun Ĉinio — interrilatoj, en kiuj Esperanto grave rolas.

En 2005 tri knaboj de la sportlernejo de Hubejo (Húbēi) — Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He — fariĝis futbalistoj en *C.D. Tortosa*. La tri 15-jaraj promesplenaj ludantoj daŭrigis sian lernadon en Katalunio kaj ĉiuvespere trejnitis futbalon. Ilia revo plenumiĝis danke al la agado de du Esperanto-aktivuloj — Manel Vinyals kaj Hu Xu — kiuj interkonatiĝis dum la ĉirkaŭmonda vojaĝo de la unua en 2004, kaj estis parto de aliaj komunaj peresperantaj agadoj. Manel Vinyals estas entreprenisto kaj Hu Xu membras en la Fuĝjana Esperanta Komerca Ligo. La okazo estis

Krom ege bongustaj manĝaĵoj (grava afero por multaj!) kaj interesaj ekskursoj estis ankaŭ belega prezento de kelkaj trupoj. Loka popola ensemblo *Modraki* kaj romaa ensemblo *Hitano* postlasis neforgeseblan impreson, kaj trupo da afrikanoj vekis grandan admiron inter ĉiuj.

Kvizo prezentita en la nova (teamo) formulo allogis preskaŭ ĉiujn. Altajn lokojn okupis alilandaj gastoj Ronald Schindler (Germanio), Faye Ibra kaj Mowelle Dooh (Kamerunio), sed la ĉefpremion gajnis perfekta pola esperantistino Wiesława Maciejczak. La duan kaj trian lokojn okupis Halina Szczepaniak kaj Daniela Zajac. Alian “et-kvizeton” gajnis Georgo Handzlik.

Marian Zdankowski

jam plurfoje sukcese ekspluatita de la kataluna kaj ĉina Esperanto-movadoj en sia informado al la gazetaro.

La futbal-rilatoj de *C.D. Tortosa* kun Ĉinio profundiĝis ekde 2005 kaj ampleksiĝis al aliaj ĉinaj urboj. La gvidantoj de la Futbal-Asocio de Fuĝoŭo opinias, ke *C.D. Tortosa* kunportos pli modernan futbalon kaj helpos la futbalon en la regiono, dum la kataluna teamo plinombrigas sian lernejon de lernantoj: en Fuĝoŭo 800 lernantoj trejniĝas en la nova filio de *C.D. Tortosa*.

En la solena oficiala inaŭguro partoprenis elstaraj aŭtoritatoj politikaj kaj sportaj. La provincaj amaskomunikiloj pritraktis la eventon kiel gravan novaĵon, kelkaj futbalistoj estis intervjuitaj de la televido de Fuĝoŭo, kiu elsendis specialan programon trifoje tage dum kvin tagoj. En la inaŭguro Esperanto aperis apud la ĉina en pluraj afiŝoj kaj estis uzita dum la solenaĵo, tial amaskomunikilo informis, ke “per Esperanto la futbalo de Fuĝjano iras al la mondo”.

Kataluna Esperanto-Asocio

Televido intervjuas la ĉinajn futbalistojn de *CD Tortosa* el Fuĝoŭo. (Fotis Hu Xu)



Unufraze

★ Eksprezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, ricevis prestiĝan premion *Cassandra Pyle*, kiun Asocio de Internaciaj Edukistoj (NAFSA) ĉiujare aljuĝas al homo, kiu ludis gvidan rolon en internaciaj interŝanĝoj je tutmonda skalo. (*Esperanto*)

★ 17 jun Germana E-Asocio havis informstandon en Mühlhausen (Turinĝujo), okaze de tutlanda delegitara renkontiĝo de la prestiĝa societo “Verein Deutsche Sprache” por defendi la germanan lingvon. (Rudolf-Josef Fischer)

★ Filio de Pola E-Asocio en Szczecin kun preskaŭ cent aliaj asocioj partoprenis 3 jun 2007 la tradician Feston *Sub Platanoj*, prezentante al vizitantoj E-ekspozicion. (Lidia Bogusz)

★ Norvega e-isto Bjørn Heggset gvidas E-kurson en Bjørgvin malliberejo por ses lernantoj, malliberuloj k gardistoj. (*Norvega Esperantisto*)

★ 200 lernejoj studas Eon en la liceo *La 2a de oktobro* en Gvineo. (Landa Agado)

★ 25 maj 2007 sub gvido de Hanoja Unio de Amikecaj Organizoj en Hanojo laboris la tria kongreso de Hanoja E-Asocio kun pli ol cent delegitoj de diversaj societoj k kluboj; oni elektis 15 estraranojn kun Nguyen Trong Bau kiel prezidanto k Nguten Phuong Mai kiel ĝenerala sekretariino. (Landa Agado)

★ Antaŭ la 84a Germana E-Kongreso, la Granda Vortaro Germana-Ea de Erich-Dieter Krause aperis en la eldonejo *Helmut Buske* (Hamburgo); kun 1679 paĝoj k pli ol 160 mil artikolvortoj; ĝi estas la plej ampleksa dulingva E-vortaro en la mondo. (Thomas Sandner)

★ 31 maj 2007 post sukcesa kvarjara aktivado ĉesis E-instrua retprojekto NESTO, pro granda laborpremo de la ĉeflaborantoj. (Adonis Saliba)

★ TEJO serĉas kandidaton por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la CO en Roterdamo, kiu laboros dum 12-18 monatoj post 1 nov 2007, kiam Kasia Marciniak vakigos la postenon. (TEJO)

La 9an de junio 2007, dek tagojn antaŭ sia 80-jariĝo, forpasis

John (Johano) Rapley (1927-2007)

esperantisto ekde 1944, la lasta direktoro de la Centra Oficejo de UEA en Herongate, librotenisto en CO en Roterdamo. Dum la lastaj jaroj li kun sia edzino Helga vivis en Francio, i.a. en *La Kvinpetalo*.

Montru viajn vizaĝojn!

Tra la mondo okazas multaj publikaj eventoj, ekzemple: Olimpikoj, Futbala Mondpokalo, diversaj kontinentaj, landaj kaj urbaj sportaj kaj sociaj eventoj, festivaloj ktp... En ĉi tiuj eventoj kuniĝas dekmiloj da personoj, sed mi neniam vidis en la popolamaso eĉ unu Esperantan flagon flirti en la aero.

Geesperantistoj! Montru vin mem, montru viajn vizaĝojn, montru viajn flagojn, kiam vi ĉeestos en sociaj eventoj en la popolamaso, donu al ĵurnalistoj pretekston por demandi sin mem: “Kia flago estas ĝi? Kies ĝi estas? De kie ĝi venas? Kion ĝi diskonigas aŭ signifas?”

Kiam ĵurnalistoj rigardas ion ekzotikan (laŭ ilia opinio) aŭ ion nekonatan de la publiko, ĉi tio interesas ilin kaj ili serĉas la respondojn. Do kaptu ĉiujn okazaĵojn kaj diskonigu Esperanton kaj estu pretaj por doni kelkajn informojn.

Gejunuloj! Se vi estas tre kuraĝaj, verd-kolorigu viajn hararojn kaj montru vin mem, montru viajn vizaĝojn (aŭ harojn), montru la Esperantan Flagon.

Paulo Kverko

Nova redaktoro de *Kontakto*



Per komuna decido de la estraroj de TEJO kaj UEA Pavel (Paŭlo) Mojajev el Ukrainio transprenos la redaktorecon de *Kontakto* de Ĵenja Amis, kiu redaktas la socikultur-an revuon de TEJO ekde 2002. Post pli ol kvinjara sukcesa laborado ŝi laŭgrade transdonos la respondecon al sia posteulo ĉi-jare.

Paŭlo Mojajev naskiĝis en 1981 kaj diplomiĝis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina

Universitato en Simferopolo, kie li nun estas instruisto pri anatomio. Kun Esperanto li konatiĝis en 2000 kaj ekde tiam aktive partoprenas la landan movadon. Ekde 2003 li okupiĝas pri provlegado de *Kontakto*, kies redaktoron li pasintjare ekhelpis kiel vicredaktoro. Partoprenantoj de pluraj Esperanto-aranĝoj povis ekkoni ankaŭ liajn muzikajn talentojn; ekzemple, en IJKoj en 2004 kaj 2005 li koncertis prezentante proprajn kantojn. Mojajev estas ankaŭ aktiva Esperanto-instruisto kaj diplomiĝis pri la Cseh-metodo. Li verkas, tradukas kaj laboras ankaŭ super Esperanta-rusa vortaro.

GK UEA

Thorsen-apogo je dispono

Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon pligrandigi siajn kolektojn, ĉar ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis subvenciojn je la valoro de 75 ĝis 250 eŭroj.

La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis 15 okt 2007 paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ [rete](#).

GK UEA

Malfaciliga plifaciligo

Ruslanda ministerio pri eksterlandaj aferoj tre pozitive prezentis la novan Kontrakton inter Ruslando kaj la Eŭropa Unio pri faciligo de viz-aranĝado por la ŝtatoj de Ruslando kaj EU.

“Ekde la 1a de junio dekoj da miloj da ruslandanoj ricevos grandegan avantaĝon en komunikado kun la ekstera mondo”, — entuziasme deklaris Vjaĉeslav Pavlovskij, ministeria direktoro de la konsula departemento. Li daŭrigis: “Multegaj entreprenistoj, sciencistoj, instruistoj kaj studentoj, lernantoj kaj ordinaruloj havantaj eksterlande parencojn aŭ dezirantaj viziti tombojn de siaj proksimuloj, povos fari tion ĉi sen la kutimaj lastatempaj malfacilaĵoj”.

Ni ekzameni la efikon de la novaj vizoreguloj por Kaliningrado. Loĝantoj de nia enklava regiono ĝis nun havis eblecon ricevi senpagan unujaran vizon, kiu ebligis multfojan vizitadon de Litovio kaj Pollando. Reciproke, litovoj kaj poloj povis ricevi senpagajn vizojn por viziti Kaliningradan regionon (plurfoje profitis tion ankaŭ esperantistoj, partoprenante Zamenhofajn Semajnfinojn en Kaliningrado). Neniu speciala invitilo estis bezonata.

Konforme al la nova kontrakto, verkita en Bruselo, ekde nun la pollanda kaj litovia vizoj kostas 35 eŭrojn. Por peti la vizon necesas prezenti originalon de invitilo. La ĝenerala konsulo de Pollando en Kaliningrado, Jarosław Czubiński, rakontis ke tiu postulo kreis anekdoton: “En Kaliningrado aperis oficiala termino *originalo de faksaĵo*”.

Multaj kaliningradanoj naskiĝis (aŭ havas parencojn) en Bjelarusio kaj Ukrainio. Por vojaĝi tien nun ili devas pagi vizon, ĉar la vojo iras tra Litovio aŭ Pollando. Aliflanke, pluraj pollandaj esperantistoj nuligis sian pli frue anoncitan partoprenon en la jubilea renkontiĝo [Sukcena Ondo](#) (Kaliningrado, aŭgusto 2007) pro la nova viza baro, starigita de Bruselaj murkonstruantoj.

Ĉu vere plifaciligo?..

Halina Gorecka

Leterkesto

En rilato al la takso de Jorge Camacho pri la Internaciaj Floraj Ludoj en la aprila numero de *La Ondo de Esperanto*, mi povas certigi, kiel sekretario de la organizinta asocio, ke la aljuĝo de la premioj, laŭlonge de pluraj jardekoj, strikte sekvis la publikigitajn regularojn, kiuj certigis plenan anonimecon de la partoprenintoj.

Hektor Alos i Font

Sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio

La maja *Ondo* memorigis pri Nikolai Lozgaĉev. Antaŭ multe da jaroj mi ricevis tre afablan leteron de li kun lia recenzo de mia poemaro *Ajn*. Poste mi tre malĝojiĝis, leginte pri lia subita forpaso. Mi ja pensis ke ni iam renkontus unu la alian, ĉar en mia responda letero al Nikolai mi ankorau ne estis certa pri mia propra E-poezia vivo. Mi tial ne povis legi/kompreni poemojn far aliaj poetoj.

Jarlo Martelmonto (Svedio)

Tutkoraŭ dankon pro la maja numero de *La Ondo de Esperanto* kun la bona recenzo de s-ro Ahomäki pri la kvin diskaj kun *Paroladoj de Ivo Lapenna*. Kiam mi ricevas vian belaspektan, interesan kaj sendependan magazinon, mi legas ĝin kun scivolemo kaj sentas min bone informita pri la okazintaĵoj tra la tuta Esperanto-Movado.

Birthe Lapenna (Danlando)



EU-respondeculo pri multlingvismo, Leonard Orban, diras, ke Esperanto ne estas la solvo.

Kontrolita plena multlingvismo

(Vide el Bruselo) En septembro la Eŭropa Parlamento (EP) debatos la kostojn de tradukado kaj interpretado.

Ne estos espero ke la Parlamento konsideros Esperanton kiel eblan solvon por la kreskanta kosto de tradukado kaj interpretado. La membroj de la Parlamento pli koncentriĝos pri eblecoj eviti malŝparadon de servoj. La Parlamento plej verŝajne adoptos novan koncepton de “kontrolita plena multlingvismo”.

Finnlanda EP-ano Alexander Stubb, de la Eŭropa Popola Partio, malfermos la debaton surbaze de detala raporto.

Stubb, membro de la Komitato pri Buĝeta Kontrolado, ekzamenis la elspezojn en 2006 por interpretado. En sia raporto, aprobita de la buĝeta komitato en junio, li ĉefe akuzas kun-parlamentanojn pro malŝparado de traduk- kaj interpret-servoj. Kaj kelkaj el la plej gravaj malŝparantoj estas tiuj, kiuj plej laŭte defendas la “grandajn” lingvojn. Malŝparemaj parlamentanoj petas tradukojn de longaj dokumentoj kaj tuttagan interpretadservon kaj poste ne aperas dum la koncerna kunveno. Laŭ Stubb ĉ. 16% da totala parlamenta interpretkosto estis malŝparita pro tio, ke la interpret-servo finfine ne estis uzita aŭ nuligita tro malfrue.

La raporto de Stubb sekvas la laboron de la Eŭropa Financkontrola Kortumo kiu kritikis la eŭropajn instancojn pro malŝparado. “Pro la neglata distribuo de tradukbezonoj dum la jaro, aŭ pro foje nesufiĉa interna kapablo, eŭropaj instancoj bezonas sendependajn tradukistojn aldone al la dungitaj”, — raportis la Eŭropa Financkontrola Kortumo. La malŝparo altiĝis je ĉirkaŭ 11 milionoj da eŭroj nur pro la malefika uzado de sendependaj tradukistoj.

Stubb en sia raporto kritikis ankaŭ la diferencon inter la kostoj por servoj laŭ instancoj. Unu tago de interpretado estas 30% pli kosta en la Parlamento ol en la Konsilio kaj Komisiono (parlamentaria interpretisto kostas ĉirkaŭ 1500 eŭrojn por unu tago kompare al “nur” 1000 eŭroj tage por la Komisiono). Sed ankaŭ tradukkostoj multe diferencas. Unu tradukpaĝo kostas €194 en la Komisiono, €276 en la Konsilio, kaj nur €119 en la Parlamento. Kaj la totala kosto de tradukservoj en la tri instancoj estis 511 milionoj da eŭroj en 2005 (kompare kun €414.5 mln en 2003).

Stubb sugestas limigi la nombron da lingvoj al la tri “gravaj” — angla, franca kaj germana (kiel faras la Komisiono kaj, pli kaj pli, la Konsilio). Laŭ la kalkuloj de Stubb, plentaga renkontiĝo de EP kun interpretado por 23 lingvoj, kun tri interpretistoj po traduk-kabino, kostas nun ĉ. 135 mil 700 eŭrojn. Se estus uzataj nur la angla, franca kaj germana lingvoj, la prezo estus nur 8 mil 900 eŭroj.

En septembro la Parlamento verŝajne akceptos la rezolucion de Stubb. La rezolucio konsideras multlingvismon “ŝlosila eco de la Eŭropa Unio kiu antaŭenigas la kulturen kaj lingvan diversecon kaj sekurigas egalan traktadon de EU-civitanoj”. La rezolucio notas la rajton de civitanoj komuniki en la propra “oficiala” lingvo kun EU-instancoj.

Tamen la rezolucio notas ke la ideo de “kontrolita plena multlingvismo” estas la nura metodo teni kostojn en akcepteblaj limoj. La teksto ankaŭ esprimas surprizon pro tio, ke “la instancoj ankoraŭ kalkulas nek siajn totalajn traduk-kostojn nek kostojn po paĝo”. Laŭ la rezolucio, EP estus “koncernita” pri la malalta produktiveco de tradukantoj en la Konsilio, kie membro-ŝtatoj kunvenas. En 2005 estis tradukitaj 1.324.000 paĝoj en la Komisiono de 1 450 tradukantoj (1.541.518 paĝoj en 2006). Ĉ. 80% de la tradukado en la Komisiono estas farita de internaj tradukantoj, kaj 20% de “eksteruloj”. En EP estis tradukitaj 1.080.000 paĝoj de 550 tradukantoj, kaj nur 475.000 paĝoj de 660 en la Konsilio.

Produktiveco, difinita kiel nombro de normalaj paĝoj tradukitaj de interna tradukanto, tre varias de unu lingva departemento al alia kaj de unu instanco al alia. “La produktiveco de la EU-tradukservoj estas multe pli malalta ol en privata sektoro, — notas Stubb [5-6 paĝoj tage por EU-tradukanto kaj 8-10 paĝoj por privata tradukanto. — DaI]. — La produktiveco de la Konsilio estas konsiderinde pli malalta ol de la Komisiono kaj Parlamento pro la alta procentaĵo de leĝaj dokumentoj, kiuj postulas specifan atenton”.

La rezolucio proponas ne plu traduki ĉiujn debatojn en ĉiujn lingvojn: “La plena raporto de debatoj en la plenkunsido devas esti publikigita kiel multlingva dokumento, en kiu la paroladoj devas aperi nur en la originala lingvo”. Sonbendo aŭ interreta filmo kun interpretado devus tiam esti disponebla. La nova regulo — kiu devos ankoraŭ esti aprobita de la Parlamenta administrado — signifos finon por la plena traduko de debatoj. EP-anoj kiuj parolas “malgrandajn” lingvojn timas perdi influon. La tradukado ricevas kritikon ankaŭ pro “... konsiderinde malalta kvalito” de traduko en la lingvoj de la novaj membro-ŝtatoj.

Stubb notas ke eŭropaj instancoj en la lastaj jaroj provas jene limigi la kreskon de tradukado: (1) starigante listojn de gravaj “kernaj dokumentoj”; (2) starigante maksimuman longecon de tekstoj; (3) tradukante nur konkludojn en aliaj lingvoj [tio estas: ne en la angla. — DaI]; (4) tradukante nur la finan version de dokumentoj; (5) kuraĝigante tradukpetantojn sindeteni de tradukpetoj.

Dafydd ab Iago

Solidareco al Marco Cappato

[HeKo] 27 maj la itala EU-parlamentano Marco Cappato kaj liaj kunlaborantoj estis agresitaj en Moskvo fare de ultranaciisma grupo. La parlamentano de la Radikala Partio, konata pro sia agado favore al esperanto, estis iranta kun delegacio, kiu volis liveri leteron al la urbestro de Moskvo. La letero koncernis la malpermeson kontraŭ la okazigo de Tago pri geja fiero en la rusa ĉefurbo.

La Konsulo de la Esperanta Civito, Giorgio Silfer, sendis al Marco Cappato mesaĝon per kiu li “esprimas sian plenan kaj sinceran solidarecon al la viktimoj de la agreso. Ksenofobio, antisemitismo kaj ĝenerale malestimo kaj eĉ malamo kontraŭ la diversulo, pro ajna kialo inkluzive de la seksa orientiĝo, estas sociaj malsanoj pro kiuj ankaŭ la esperanta popolo suferis kaj suferas”.

La Konsulo aldonis, ke “eĉ esperanto-organizoj povas esti infektataj de tiu malsano: Internacia Esperanto-Ligo, fondita en 1936 kaj ĝis nun ekzistanta sub alia nomo, antaŭ la mondmilito sed ankaŭ poste toleris agojn kiuj kontraŭas la homajn rajtojn, nome de neŭtraleco interpretata kiel politika indiferentio. Tian eraron ne intencas fari la Esperanta Civito, kaj tial mi estas al vi skribanta ĉi tiun leteron”.

Oficialaj Aldonoj — la vivanta lingvo fajfas pri tio

La jar-kolekton 2006 de *Heroldo de Esperanto* markas polemiko inter Perla Martinelli kaj Bertil Wennergren pri la t. n. Naŭa Oficiala Aldono (OA) al la Universala Vortaro (UV), polemiko kiu manifestas la disopiniadon ene de la Akademio. Se konsideri, ke el 45 anoj de tiu fikcia institucio voĉ-donis nur 33, t. e. 73,3 %, se plue konsideri, ke iuj radikoj ricevis la aprobon de nur 23 personoj, oni vidas, kiel arogante estas, se tia grupeto da anonimuloj pretendas direkti la lingvo-uzon de Esperanto.

En sia artikolo “Kial fari Oficialajn Aldonojn” (*La Ondo de Esperanto*, 2007, №6, pĝ. 13–14) Wennergren varbas por tiu vorto-listo kaj eĉ por la difinoj ofte infanecaj kaj primitivaj, sed sin implikas en kontraŭdirojn kaj absurdojn. Parolante pri tio, ĉu ĉi cent-jara (mis)praktiko de la Akademio (ankoraŭ) havas sencon, li allasas, ke “vere la afero povas ŝajni sufiĉe duba”. Nu, ĉi dubojn li sukcesis forbalai nek per sia listo nek per siaj eksplikoj. Se temas pri la nomenklaturado, nek la vorto “oficiala” diras ion nek la vorto “Universala” (Vortaro). Ĉar kio en ĉi arbitra miŝmaŝo universalas? Ĝis nun neniu scias, laŭ kiuj kriterioj Zamenhof kompilis ĝin. Same oni ne konas la kriteriojn kiuj kondukis al la Aldonoj: tio iras ĝis la absurdo, ke la vorto “Esperanto” oficialiĝis nur en 1958!

Se la UV “estas unu el la plej aŭtoritataj”, kial do jam antaŭ 1914 la Lingva Komitato eldonis kvin kajerojn kun korektoj? Kaj se Wennergren koncedas, ke ankaŭ la Oficialaj Aldonoj enhavas erarojn, kial tamen li nomas ilin “rekomendindaj”? Se io estas eraro, ĝi postulas korekton, ne rekomendon. Sian pledon daŭrigi la infanecan ludon de “oficialigado” li povas pravigi nur per la argumento de la tradicio. Se ankoraŭ konsentblas ornami morfemojn per “ofialeco”, neniel eblas trudi tion ankaŭ al la difinoj kaj kunmetoj. La lastaj estas pure hazardaj, la unuaj intence verkitaj en ia Basic Esperanto por “ordinaraj” esperantistoj (ju pli multaj, des pli stultaj, kiel diris Grosjean-Maupin) kaj tute ne kongruaj kun ali-lokaj difinoj (ekz. en PIV).

Jen ekzemplo: la 9a OA “oficialigas” la radikon *eŭfemism*, kiu estas termino stilistika kaj “difinas” ĝin jene:

evitvorto, evitesprimo kun la ekzemploj: kuŝi = seksumi (*seks* kaj *um* ja estas fundamentaj, sed ne la kunmeto), etna purigado = popolmurdo, t. e. genocido (la vorton *etno* oni oficialigis por ke ĝi povu figuri en ĉi difino). Por la vorto “necesejo” mankas la malevitvorto, kvankam jam en 1910 K. Bein en sia *Vortaro de Esperanto* difinis ĝin “loko, kie oni pisas kaj kakas” (sen registri *pis* kaj *kak* en la alfabeto vico).

En sia difino de *cico* la 9a OA tute ne uzas la kuranton “mampinto” (kiu mampis estas mampinto), al kiu resendatas, por ekzemplo, la vortaro de Krause (Eo-D).

Jen kelkaj nekonsekvencoj en la vorto-listo mem: se *aperitivo*, kial ne *digestivo* (brando, likvoro)? Laŭ la 9a OA nur Japanujo estas oficiala, kvankam la sama Akademio delonge oficialigis *-io* kaj kvankam la plimulto uzas ĉi sufikson. Se *pisi*, kial ne *kaki* kiun la *Hejma Vortaro* de Lindstedt klasifas ĉiu-taga esprimo? Kaj kio pri *frid-pisa* (ĉu hibrido el oficiala kaj neoficiala elemento)? Se enestas *vodko*, kial ne oficialas eĉ ĉiuj ceteraj brandoj? Kaj kial ĝi estas produktata en Rusujo kaj Svedujo, sed ne en Polujo, sed en Pollando?

Ankoraŭ detaleta kiu dokumentas la malsistemecon: la uzo de la ligo-streko. Oni ja trovas: Nord-Ameriko (ĉe bizono), tamen Orientĉina (ĉe ĉino), helpo-agado (ĉe kvakero), nigra-blanka (ĉe pingveno), vir-mamulo (ĉe prostato), iks-radioj (ĉe radiografii), Sud-Ameriko (ĉe tapiro), Sud-Afriko (ĉe unio). Sed kial ne: imun-sistemo (aidoso, alergio), kurac-metodo (akupunkturo), korpopunkto (sam-loke), ŝajn-piedoj (amebo), ktp. Mankas klara regulo.

Resume: La lingvaj bezonoj troviĝas ali-loke ol en la oficialigo de vortoj, ekzemple en la kompilado de historia vortaro kiu informas pri la unuaj uzoj de radikoj kaj vortoj. Praktike neniu scias, kiu vorto oficialiĝis kiam. La vivanta lingvo delonge fajfas pri ĉi sensenca maroto de numerado kaj etiketado. Se superfluas tia-speca registrado, superfluas eĉ la registrantoj. Feliĉe, Esperanto vivas kaj povas vivi sen tia ekstravaganco kaj sen tia Akademio neniel ekzistanta en la pulsanta vivo de la lingvo.

Reinhard Haupenthal

Vortaroj: utilaj kaj verkindaj

En *Oficialaj Aldonoj — la vivanta lingvo fajfas pri tio* Reinhard Haupenthal bedaŭrinde prezentas plurajn malĝustaĵojn, kiujn necesas ĝustigi:

Haupenthal nomas la Akademion “grupeto da anonimuloj”, sed la nomoj de la Akademianoj kompreneble estas tute publikaj. Oni povas ilin trovi ekz. en la TTT-ejo de la Akademio (<http://akademio-de-esperanto.org/faktoj/membraro.html>) aŭ en la Jarlibro de UEA.

Li skribis, ke “la vorto *Esperanto* oficialiĝis nur en 1958”. Tio ne estas tute ĝusta. La vorto *Esperanto* estas kompreneble Fundamenta, kaj do ne bezonas oficialigon. Pro tio, ke ne ĉiuj vortoj en la Fundamento aperas en la vortlistoj de la *Universala Vortaro*, la Lingva Komitato kaj la Akademio iom post iom registris ĉiujn tiujn ekster-UV-ajn radikojn. Tio okazis pri la vorto *Esperanto* en 1958 kadre de la Sepa Oficiala Aldono. Sed tie *Esperanto* estas menciita sub “Fundamentaj radikoj”, ne sub “Oficialaj radikoj”.

Li skribis:

Se la UV “estas unu el la plej aŭtoritataj”, kial do jam antaŭ 1914 la Lingva Komitato eldonis kvin kajerojn kun korektoj? Kaj se Wennergren koncedas, ke ankaŭ la Oficialaj Aldonoj enhavas erarojn, kial tamen li nomas ilin “rekomendindaj”? Se io estas eraro, ĝi postulas korekton, ne rekomendon.

Aŭtoritateco ne egalas al perfekteco aŭ senerareco. Ĉiuj niaj vortaroj enhavas erarojn, ankaŭ ekz. la *Plena Ilustrita Vortaro*. Ankaŭ PIV-on oni iom post iom korektas. Sed tamen PIV estas de multaj rigardata kiel pli aŭ malpli aŭtoritata. Kaj ankaŭ PIV faras rekomendojn kaj malrekomendojn. Do, nenio stranga en tio, ke ankaŭ la Fundamento kaj la Oficialaj Aldonoj enhavas neperfektaĵojn. Ili tamen povas esti utilaj verkoj.

Haupenthal skribis: “la vorton *etno* oni oficialigis por ke ĝi povu figuri en ĉi difino [= en la difino de *eŭfemismo*]”. Tio ne estas prava. La vorto *etno* estis en la origina listo de kandidatovortoj por 9OA. Tion mi sciigis al Haupenthal en mesaĝo jam antaŭ ol lia artikolo estis finita, sed eble li preteratentis tion.

Li skribis: “Laŭ la 9a OA nur Japanujo estas oficiala, kvankam la sama

Akademio delonge oficialigis *-io*.” Neprave. La sufikso *-io* ankoraŭ estas neoficiala. La Akademio tamen ekde 80A ne plu malrekomendas tiun sufikson. Nuligo de malrekomendo tamen ne egalas al starigo de rekomendo, kaj do ne al oficialigo.

Hauptenthal demandas: “Se *pisi*, kial ne *kaki* kiun la *Hejma Vortaro* de Lindstedt klasifas ĉiu-taga esprimo?” Estas prave, ke la vorto *kaki* havas la karakteron de ĉiu-taga esprimo, simile kiel *pisi*. Sed la vorto *kaki* tute ne estas same disvastiĝinta kiel *pisi*. Multaj Esperantistoj tute ne uzas ĝin, nek eĉ scias pri ĝia ekzisto. Ĝi do ankoraŭ ne fariĝis sufiĉe enradikiĝinta por meriti same urĝan traktadon kiel ekz. *pisi* kaj *feki*, kiujn la Akademio inkluzivis en 90A. Eble iam poste venos la vico ankaŭ al *kaki*. Sed simple ne eblas ĉiujn vortojn trakti samtempe.

“Se enestas *vodko*, kial ne oficialas eĉ ĉiuj ceteraj brandoj?” Ĉar la vorto *vodko* estas tre enradikiĝinta kaj bone konata, dum aliaj brandonomoj ankoraŭ ne estas tiaj.

“Praktike neniu scias, kiu vorto oficialiĝis kiam. La vivanta lingvo delonge fajfas pri ĉi sensenca maroto de numerado kaj etiketado”. Jes, numerado kaj etiketado* estas malgravaj kaj ofte neinteresaj. Sed verkado de vortaroj, kiuj faras konkretajn rekomendojn kaj malrekomendojn, ne estas sensenca. La *Universala Vortaro* kaj la *Akademia Vortaro* estas tiaj vortaroj, same kiel ekz. PIV. Se Hauptenthal tiom forte kontraŭas verkadon de vortaro, kiu faras eksplikitajn rekomendojn, tiam li devus same kontraŭi ankaŭ la *Plenan Ilustritan Vortaron*. Laŭ mi tamen vortaroj estas utilaj kaj verkindaj, kaj certe la Akademio daŭrigos aktivon sur tiu kampo. Kial do la Akademio ne rajtus verki vortaron, se aliaj rajtas?

Bertilo Wennergren,
Direktoro de la Sekcio
pri la Ĝenerala Vortaro

* La vorto *etikedo* estas unu el la vortoj en 90A. *Etiketo* (en 30A) prefere ne estu uzata kun la signifo de *etikedo*.



Esperantistoj ĉefrolis en scienca konferenco

18–19 maj 2007 en Kaŭno (Litovio) okazis internacia interfaka scienca konferenco FIHUSO-2007 kun 204 partoprenantoj el 33 landoj. Ĝin organizis Kaŭna humanisma fakultato de la Vilna universitato. La konferenco pasis en la pleno kaj en la kvin sekcioj (informadiko, lingvistiko kaj literaturo, interlingvistiko, ekonomiko, entreprenado). Kvankam la konferenco estis tre vasta kaj diversflanka, tamen Esperanto kaj esperantistoj en ĝi ĉefrolis.

Verŝajne, unuafoje en ĝenerala scienca konferenco tiom multe da atento estis dediĉita al Esperanto. Inter la konferencanoj estis 21 esperantistoj el 16 landoj. En la scienca komitato de la konferenco estis ses famaj esperantistoj: prof. Humphrey Tonkin, prof. Renato Corsetti, prof. Geraldo Mattos, prof. Balazs Wacha, prof. Wim Jansen, prof. Aleksandr Duliĉenko. La honora prezidanto de la scienca komitato estis nobelpremiito prof. habil. dr. Reinhard Selten. Inter la ĉefparolantoj de la konferenco en la plenkunsido estis kvin esperantistoj. Ĉiuj ili kaj aliaj esperantistoj prelegis dufoje: en la angla aŭ litova kaj ankaŭ en Esperanto en la interlingvistika sekcio:

Michael Cwik (Belgio). *Kiamaniere intertempe atingi nediskriminacion en interetna, interkultura kaj internacia komunikado? Longdaŭra strategio por eviti lingvan diskriminacion.*

Prof. Heiner (Aŭstrio). *Pri la “nekonata lingvo” (lingua ignota) far la germana abatino Hildegardis de Bingen.*

Prof. Carlo Minnaja kaj prof. Laura Gilda Paccagnella (Italio). *Matematika vortaro por Esperanto laŭ la strukturo de Wordnet.*

Madis Linnamagi (Estonio). *Estilo — lingva projekto de Hans Koop.*

Katarzyna Tempczyk (Pollando). *Interpretado de bibliaj tekstoj laŭ privataj revelacioj — je ekzemplo de katolika eklezio de mariavitoj.*

Prof. Aloyzas Gudavičius. *Verda koloro en la litova lingvo.*

Aida Ĉiĝikaitė (Litovio). *Esprimo de tempo en Esperanto — gramatika aspekto.*

Prof. Vera Barandovská-Frank (Germanio). *Lingvistiko en interfaka perspektivo: hobiolingvistiko* (prezentis Aida Ĉiĝikaitė).

Estis planitaj ankaŭ prelegoj de prof. Reinhard Selten (Germanio), Ingrida Muraškovska (Latvio), prof. Nina Danylyk (Ukrainio), Radojica Petrović (Serbio), prof. Aleksandr Melnikov (Ruslando). Ili ne povis veni, sed ankaŭ iliaj prelegoj estas resumitaj en la konferenca libro, kies esperantlingvan parton redaktis Aida Ĉiĝikaitė — kunprezidanto de la interlingvistika sekcio.

La dekano de la fakultato, prof. Stasys Girdzijauskas, en renkontiĝo kun la partoprenantoj emfazis gravecon de kunlaboro kun esperantistoj kaj esprimis deziron estonte pli vaste okupiĝi pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj en la fakultato.

Povilas Jegorovas

Iom pri kiĉo

La germana vorto “Kitsch” ekestis en artistaj rondoj ĉ. la jaro 1870. Ĝia deveno estas neklara. Ni ne scias kiu enkondukis la vorton *kiĉo* en Esperanton: ĝi mankas ĉe Wüster (1929) kaj en PV (1930), same en *Parnasa Gvidlibro* de 1932. Ties dua eldono (1968) registras ĝin kun jena difino: “Filistra artaĵo, plaĉa nur al malbongustuloj”. PIV (1970) difinas jene: “Filistra sengusta artaĵeto”. La adjektivo ne estas menciita. Ambaŭ difinoj estas ne kontentigaj, ĉar tro striktaj kaj ne sufiĉe precizaj. Mankas ekzemploj. Jen nova provo difini la vorton:

kiĉo. Produkto de la prezenta arto, de la muziko aŭ de la literaturo, el difinita art-kompreno sentata kiel sengusta; senguste formita, puca uz-objekto: literatura, sentimentala, religia ~o; *ĉi bildo estas pura kaj nura ~o; en lia loĝejo disstaras ĉia-speca ~o; la limo inter ~o kaj arto ofte fluktuas.* ~figuro, ~filmo, ~kanto (vd. kantileno, ŝlagro), ~objekto, ~penaĵo, ~romano (vd. melkalo), ~statuo. ~[a. 1. formita en maniero sentata kiel sengusta, ŝajniganta artisman valoron: ~a porcelano, ~a statueto (de Sankta Jozefo, Zamenhof), ~a madono, ~a sanktulfiguro, ~aj vestoj. 2. kor-tuŝe sentimentala; afektite sentema: ~a filmo, ~a poemo (de Deŝkin). ~igi. Transformi en kiĉon: *la esperantistoj ~igis la poemon “La Espero” de Zamenhof; usonaj filmoj ~igas historiajn suĝetojn.*

Reinhard Hauptenthal

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (2)



burokrat/o 1 Oficisto en administrejo (ŝtata), rigardata kiel parto de sistemo por regado kaj administrado. (Se oni parolas konkrete pri persono, oni preferas vortojn kiel *oficisto*, *administranto*, *funkciulo* k.s.) 2 (malŝate) Persono, kiu rigore sekvas la administrajn regulojn kaj rutinojn, sed ignoras la bazan celaron de la laboro aŭ la demokratian devon reagi al publikaj kritikoj. **burokrat/ar/o**. Tuto de la burokratoj 1 (en unu ŝtato k.s.). **burokrat/ism/o** 1 Sistemo de (kvazaŭa) regado fare de la burokrataro; administra sistemo, en kiu la burokratoj 1 havas tro da povo aŭ influo. 2 (malŝate) La procedo-troigaj tendencoj de burokrato 2; sistema flegado aŭ apogado de tiaj tendencoj.

cic/o. Elstarajo ĉe la mamoo de homoj kaj aliaj mamuloj, tra kiu ĉe inoj la idoj suĉas lakton. **cic/um/o**. Longa cicoforma botelkovrilo kun truo ĉe la pinto, tra kiu infano suĉas lakton.

ĉirkumcid/i. Detranĉi parton de la haŭta refaldo, kiu ĉirkaŭas la kapon de penis (la glanon) por lasi tiun libera (pro higienaj, medicinaj aŭ religiaj kialoj): *ĉirkumcidi infaneton*.

ĉampion/o. Venkinto en grava sportokonkurso (urba, landa, tutmonda...).

ĉasi/o. Baza framo de rada veturilo, portanta karoserion, motoron, aksojn, radojn ktp.

ĉimpanz/o. Senvosta simio homsimila kun grandaj elstaraj oreloj, kaj kun brakoj pli longaj ol la kruroj, malhelhara, vivanta en centra kaj okcidenta Afriko. (*Pan troglodytes*.)

ĉin/o 1 Ano de la ĉefgento de Ĉinujo. 2 (vastasence) Ĉinujano. **Ĉin/uj/o**. Lando en orienta Azio, ĉe la Flava Maro, la Orientĉina Maro kaj la Sudĉina Maro, inter Rusujo kaj Birmo. Internacia landokodaĵo: CN.

defi/i. Inviti aŭ provoki al batalo, konkurso k.s. prezentante sin mem kiel kontraŭulon: *defii boksan ĉampionon*; *defii iun batali*; *defii iun je/al batalo*; *defii amikon ŝakludi*; (figure) *ŝakludo defias la intelekton*.

delt/o 1 La kvara litero de la greka alfabeto: Δ, δ. 2 Pli-malpli triangula ebenaĵo, kiu estas formita el materialo alportita de la akvofluo, kaj tra kiu disbranĉiĝas rivero ĉe sia enfluo en maron aŭ lagon.

demografi/o 1 Scienco pri la konsisto de la loĝantaro kaj pri ĝia evoluo.

2 Informoj pri la nombro, konsisto kaj loka distribuo de la loĝantaro, kaj pri tendencoj de ilia evoluo: *demografio de la urboj*; *demografio de la kamparaj regionoj*.

detektiv/o 1 Polica esploristo, kies tasko estas eltrovi la faktojn pri krimoj. 2 Privata esploristo, kiu provas eltrovi la faktojn pri krimoj aŭ aliaj aferoj, ekz. komisie de privatulo.

dies/o. Muziknota kromsigno, kiu montras altigon de tono: #.

diskriminaci/i. Oficiale aŭ efektive fari distingon inter personoj, tiel ke oni rifuzas al parto el ili rajton, kiun oni donas al aliaj el ili: *diskriminacii eksterlandanojn*; *diskriminacii malplimulton*; *diskriminaciata popolo*.

diskriminaci/o. Ago diskriminacii: *rasa diskriminacio*; *seksa diskriminacio*; *diskriminacio kontraŭ virinoj*; *diskriminacio laŭ aĝo*; *pozitiva diskriminacio*.

dizert/i. Fuĝi el militservo kun intenco ne plu reveni al ĝi: *la soldatoj dizertis*.

drast/a. Fortege, malmilde, rapide, radikale efikanta: *drasta medikamento*; *drasta ŝanĝo*; *drasta kresko*; *drasta esprimo*; *drasta kontrasto* (= kreanta fortan impreson).

driv/i 1 Flosi laŭ la puŝo de akvo-fluo aŭ vento (sensstire, en alia direkto ol intencite, sen klara direkto): *la ŝipo drivis pro motordifekto*. 2 Deflankiĝi de la intencita direkto pro puŝo de vento aŭ akvofluo: *la kuglo drivis pro la forta vento, kaj tial ĝi ne trafis la celon*. **driv/o** 1 Ago drivi. 2 Malrapida ŝanĝiĝado aŭ moviĝado en ia sistemo (sen klara celo aŭ direkto): *kontinenta drivo*; *lingva drivo*.

ekologi/o 1 Reciprokaj influoj inter vivantaj organismoj kaj ties natura medio. 2 Scienco pri ekologio 1.

etiked/o. Peco de papero aŭ alia materialo kun aŭ por surskribo, alfiksitata aŭ alfiksebla sur aŭ al io, por montri enhavon, specon, adreson ktp.

etn/o. Gento. Historie estiĝinta homgrupo, kies vivmanieron karakterizas komunaj trajtoj kulturaj, civilizaciaj aŭ religiaj, kaj kiu konscias pri tiu

komuneco. (Komunaj lingvo, lando aŭ socipolitika strukturo estas ofta, sed ne nepre trajto de etno. Kontraste al *gento*, *etno* ne insistas pri deveno de komunaj prauloj, fikciaj aŭ realaj.)

etnologi/o. Scienco pri la homaj etnoj kaj iliaj diferencoj (uzanta faktojn kolektitajn per etnografio); socia kaj kultura antropologio.

etos/o. Reganta humoro aŭ spirita atmosfero kreata de ĉeestantaj homoj, ĉirkaŭaĵo, cirkonstancoj aŭ artaĵo: *la etoso en la oficejo estas streĉa*; *la spektaklo/muziko kreis agrablan etoson*.

eŭfemism/o. Evitvorto, evitesprimoo. Vorto aŭ esprimo uzata por mildeco anstataŭ diraĵo, kiu povas esti rigardata kiel tro kruda, tro malagrabla, tro sankta aŭ simile: *“kuŝi” estas eŭfemismo por “seksumi”*; *“etna purigado” estas eŭfemismo por “popolmurdo”*; *la vorto “necesejo” estas eŭfemismo*.

eŭkalipt/o. Ĉiamverda rapidkreska arbo indiĝena en Aŭstralio, kun tre alta trunko kaj kun folioj enhavantaj oleon fortodoran kaj seninfektigan, kreskigata por medikamenta kaj papera industrio. (*Eucalyptus*.)

eŭr/o. Monunuo de Eŭropa Unio: *centono de eŭro estas cendo*; *ĝi kostas dek eŭrojn kaj kvindek cendojn*.

farĉ/o. Hakita (kaj spicita) viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo, kiun oni enmetas en la internon de kuirota manĝaĵo. **farĉ/i**. Plenigi la internon de manĝaĵo per farĉo: *farĉi anseron per prunoj kaj pomoj*; *farĉi tomatojn*; *bovo farĉita per anasoj kaj kokinoj*; *farĉitaj terpoj*.

fek/i. Eligi ekskrementon el la anusoo: *li fekas en la necesejo*; *la hundo fekis*. **fek/o**. Ago feki kaj ties rezulto (fekaĵo). **fek/aj/o**. Ekskremento eligita el la anusoo.

festival/o 1 Renkontiĝo dediĉita al arto (muziko, kino ktp.), ofte perioda kaj internacia: *la Berlina Film-Festivalo*; *la Kultura Esperanto-Festivalo*. 2 Amasa renkontiĝo kun parte festa karaktero: *la Monda Festivalo de Junularo kaj Studentaro*.

folklor/o. Popola tradiciaro arta kaj spirita (legendoj, kantoj, vestoj k.s.).

fot/o. Fotografaĵo. **fot/i**. Fotografi: *foti iun*; *foti ion*.

fram/o. Ĉefparto (trabaro) de objekto, portanta la aliajn partojn de la objekto: *framo de maŝino*; *framo de piano*; *framo de biciklo*.

Daŭrigota

Poemoj de Miĥail Lomonosov

“Li kreis la unuan universitaton. Pli ĝuste, li mem estis nia unua universitato”, — skribis Puŝkin. Temas pri Miĥail Vasiljeviĉ Lomonosov (1711–1765), la unua grava ruslanda natursciencisto, kreinto de la unua kemia laboratorio en Ruslando, iniciatinto de la Moskva Universitato kiu nun portas lian nomon, historiisto, astronomo (en 1761 li malkovris la atmosferon en Venuso), akademiano...

Li estas rimarkinda ankaŭ kiel konstituinto de la rusa literatura lingvo, kreinto (kun Vasilij Trediakovskij, 1703–1768) de la rusa silabo-tona versfarado. Kun Trediakovskij, Antioĥ Kantemir (1708–1744) kaj Aleksandr Sumarokov (1718–1777), Lomonosov fondis kaj fortikigis la rusan klasikismon — la unuan rusan literaturan skolon. Odoj famigis lin, sed interesaj estas ankaŭ liaj satiroj, dramoj kaj etaj poemoj originalaj kaj tradukitaj. Tri el ili, tradukitaj de Valentin Melnikov, estas ĉi-sube.

Per traduko de *Formiko* el Marcialo li defendis la organikan devenon de sukceso. Scienc-rilata estas ankaŭ la dua poemeto, en kiu Lomonosov versigis la konatajn vortojn komparantaj la funkciajn rolojn de la Tero kun tiu de rostata alaŭdo el *La ŝtatoj kaj imperioj de Luno* (1649, publ. 1662) de Cirano de Bergerac (1619–1655). La tria estas libera traduko de *Al cikado* de Anakreono, al kiu Lomonosov aldonis version, en kiu li aludas sian malfacilan situacion inter la Scienco kaj la Potenco.

AIKO



Valentin Melnikov jubileas!



La 18an de julio sian 50-jaran jubileon kaj samtempe la 25-jariĝon de sia esperantisteco festas nia multjara amiko kaj kunlaboranto Valentin Melnikov, la homo kun altega intelekto kaj erudicio, kun pura arda animo kaj verka talento.

Li estas konata kiel brila poeto kaj tradukisto. Por ni speciale gravas lia eminenta laborkapablo: li povas dum kelkaj tagoj fari ion (ekzemple, verki recenzon), por kio alia bezonas plurajn monatojn, kun ne malplia kvalito.

Ekster Esperantujo oni konas lin laŭ diversaj intelektaj ludoj, sportaj kaj televidaj, en kiuj li multfoje venkis, iĝinte en 2006 ĉampiono de Ruslando pri *Kio? Kie? Kiam?* La jubileanto multe popularigas Esperanton inter intelektuloj.

Ĉiam sincera, Valentin ne toleras maljuston — pro tio lin malamas iuj, kies fiagojn li senmaskigas. Sed honestaj esperantistoj ĉiam estimas lin.

Ni gratulas Valentin-on, deziras al li firman sanon, familian feliĉon kaj kreajn sukcesojn!

La Ondo

*En popla ombro promenante, formiket'
Al guto da rezin' gluiĝis per pied'.
Por homoj dum la viv' ĝi estis bagatela,
Postmorte en sukcen' estiĝis jam juvela.*

(1747)

*Du Astronomoj venis kune al festen'
Kaj ardis en disputo sen interkompren'.
Unua diris: "Ter' la Sunon ĉirkaŭiras";
Alia — ke la Sun' kun si planedojn tiras.
Jen estis Kopernik', alia — Ptoleme'.
Ridete kuirist' decidis per ide'.
Demandis mastro lin: "Ĉu vi la stelojn konas?
Do diru, kiel vi pri tiu dub' rezonas?"
Respondis tiel li: "Ke pravas Kopernik',
Mi pruvos sen viziti Sunon, por eksplik':
Ĉu aŭdis iam vi pri kuiristo-dupo,
Ke turnus fajron li ĉirkaŭ viand' aŭ supo?"*

(1761)

VERSOJ, VERKITAJ DUMVOJE AL PETERHOF,

**kiam mi en 1761 veturis por peti
subskribi privilegion por la Akademio,
provinde multfoje pli frue la samon**

*Lokusto kara, kiom estas vi beata,
ke pli ol homoj per feliĉo vi dotata!
Pasigas vivon vi en sin' de mola greso
kaj ĝuas roson mielgustan vi sen ĉeso.
Kaj kvankam iuj taksas vin estaĵo por neni',
sed en la pleja ver' vi reĝas antaŭ ni:
Anĝel' en korpo, eĉ senkorpa vi, en vero!
Saltadas, kantas vi sen zorgoj, en libero;
en ĉiu tera lok' vi propran hejmon havas;
nenion petas vi, ne ŝuldas, ĉiam pravas.*

(1761)

Tradukis el la rusa Valentin Melnikov



Nia Bestoĝardeno

Novelo de Tim Westover

Tim Westover estas 25-jara usona programisto kaj studento de la rusaj lingvo kaj literaturo. Li estis estrarano de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko de 2002 ĝis 2005. Liaj noveloj estis premiitaj en la Belartaj Konkursoj en 2005 kaj 2006. *Nia bestoĝardeno* estis laŭde menciita en *Liro-2006*.

La plej ofte vizitata estaĵo en nia bestoĝardeno estas la fenikso. Ĝian lokon inter la unukornulo kaj la marvirino ĉiam ĉirkaŭas bruemaj geinfanoj kun balonoj kaj glaciaĵoj. La gepatroj senzorge klaĉas inter si kaj ne atentis la infanojn, ĉar la fenikso estas nedanĝera besto. Ĝi sidas inter la branĉoj de pokopagoarbo kaj serĉas insektojn, kiujn allogis la bonodoraj floroj. La infanoj gaje krias kiam la fenikso trovas blaton aŭ papilion, ĉar ili devas esti pli bongustaj, ol la griza supo, kiun proponas la bestoĝardenestro.

Tri fojojn semajne, la bestoĝardeno okazigas spektaklon pri la fenikso.

Nia bestoĝardeno estas novmoda, kaj la vizitanto ne volas vidi beston nur en kaĝo. Dum la spektaklo, tri flamo-turoj lumigas la scenejon, kaj la plumoj de la fenikso brilas per la tuta ĉielarko. Malantaŭ si ĝi trenas diafanan voston, kiu tuŝas niajn kapojn kiam la fenikso rondflugas super ni. Fonografo aŭdigas heroan muzikon, kaj ni aplaŭdas. La fenikso tiam alteriĝas sur arbuston en la mezo de la scenejo. Belulino vestita kiel araba haremanino dancas ondobrake, dum ŝi rakontas la legendon: ĉiun jarmilon la fenikso mortas en flamo kaj renaskiĝas el la cindroj kun korpo bela kaj juna. Virinoj aŭskultas tiujn vortojn kaj raviĝas, sed viroj nur rigardas la ŝultrojn de la belulino kun bedaŭro. La belulino prenas tukon kaj tenas ĝin inter la spektantoj kaj fenikso en la arbusto, kaj ni ĉiuj atendas kun streĉitaj koroj. Cimbaloj sonoras kaj piroteknikaĵoj saltas de malantaŭ la tuko, kaj ni buŝaperte spektas la arbuston cindriĝi. La belulino kovras la cindrojn, ĉi-foje per la verda tuko. Dum kelkaj teruraj momentoj ni kuraĝas nek spiri nek esperi. Subite la lumoj ekbrilas kiel sunoj, kaj la tuko leviĝas kaj malaperas en verdaj fajreroj — la fenikso vivas! Ĝi raŭke krias sian venkon super la morto kaj rondflugas niajn kapojn. Se kelkaj cindroj falas sur nin, ni taksas tion beno pro nia fido.


Pli amata de ni estas la marvirino. Dum someraj tagoj ŝi naĝas en la lageto, kaj ni sidas en subtera ĉambro kun vitra muro kaj spektas ŝiajn subakvajn piruetojn. En la vespero kaj dum la vintro ŝi sidas sur roko kaj kombas sian oran hararon aŭ kuŝas en la groto kaj kantadas dolĉajn marvirinajn fabelojn tradukitajn el la mara lingvo. Ŝia nazo estas tiu de nobelino, kaj ŝi diras, ke sub la ondoj ŝi estis princino kaj venis al la bestoĝardeno por lanĉi karieron kiel filmstelulino. Volonte ŝi reportus gaston al sia palaco en la maro — vi povas longe teni la spiron, ĉu ne? Jes, ni diras, kaj ni ekkonkursas pri spirtenado. La marvirino sub la umbiliko havas belan verdan fiŝvoston; super la umbiliko ŝi portas nur mamzonon el fuko kaj konkoj, kiu sufiĉas por igi ŝin deca sed bele provizas la imagipovon. Rande de ŝia lageto estas lernantoj de la pentrista fakultato en la urba universitato.

Kelkaj aranĝas kolorojn sur kanvasoj laŭ propra koncepto de marvirino; kelkaj nur aranĝas revojn.

En la bestoĝardeno estas ankaŭ trio de baziliskoj, sed, por protekti la vizitantojn, la baziliskoj vivas malantaŭ nigra kurteno. De malantaŭ la kurteno aŭdiĝas fojfoje laŭtega sono kiel ronkado, sed ŝildo klarigas, ke temas pri voko al pariĝo. Ni kredas, ke la baziliskoj estas la malplej interesaj el ĉiuj bestoj, sed ni legas la ŝildon kaj staras kiel statuoj antaŭ la kurteno por subteni la bestojn, ĉar ili ja estas niaj.

Kampo en angulo de la bestoĝardeno estas fekunda tero por floranta planto, kies frukto similas al ŝafidoj sed kun purpura glata haŭto kiel melongeno. Samkiel ŝafidoj, la fruktoj blekas, kaj de tempo al tempo la blekado similas balbutan lingvaĵon kaj ridigas la spektantojn. Se putras unu el la ŝafido-fruktoj dum ĝi ankoraŭ pendas de la planto, la aliaj fruktoj pli akre kaj laŭte blekas, kaj por ni tio estas komedio unuaranga. Ni permesas, ke oni fortranĉu la putran frukton nur kiam la odoro fariĝas pli granda, ol la amuzo. La bestoĝardenestro dum aŭtuno rikoltas la ŝafidojn-fruktojn kaj faras el ili marmeladon, kiun li vendas sub la propra marko en la bestoĝardenaj vendejoj. La gejunuloj en la urbo amas ĝin kaj metas ĝin sur panon aŭ kukojn, sed la maljunuloj evitas la marmeladon. Ili memoras la malfacilajn jarojn, kiam mandragoro ekfloris en la urba placo. Por la maljunuloj kiantaj fruktoj diferencas nur en detaloj.

La unukornulo dum sia longa vivo havis multajn aventurojn. Kompreneble ĝi ne rakontas mem, nur manĝas herb-aĵojn la tutan tagon. La bestoĝardenestro sidas apud la kaĝo de la unukornulo kaj distras nin per rakontoj. Fojfoje ili estas streĉaj: la unukornulo kaptiĝis en milita malliberejo kaj helpis siajn kamaradojn eskapi, aŭ pro malbonega vetero



Bildo de Serge Sire

ĝi fuĝis en dometon kaj tie amikiĝis kun diversaj interesaj homoj. Sed pli ofte la rakontoj estas amuzaj: la unukornulo manĝis ĉokoladan biskvitojn kaj ĉagreniĝis, aŭ nevole aperis en aĉa spektaklo anstataŭ fama kantisto. Kvankam ni aplaŭdas la unukornulon, nian plej amitan ĉevalon, ĝi neniam kliniĝas aŭ eĉ henas por agnoski nin. La bestoĝardenestro diras, ke estas tre malfacile dresi unukornulojn kaj tial ĝi havis tiom da aventuroj. Dreseblaj bestoj havas nur proz- aĉajn vivojn.

Neniuj el la nunaj enloĝantoj de la bestoĝardeno egalas en niaj memoroj la du feinojn, kiuj nomiĝis Vola kaj Vela. Ili staris ne pli altaj ol tagmezaj ombroj kaj havis nur po unu flugilon. Sed kiam la du feinoj brakumis sin, ili povis flugi preter la pinto de la preĝejo. Dum la somero Vela kaj Vola ludis koncertojn. Vola havis violonon el skarabokarapaco kaj arkon el la propraj haroj; Vela ludis bekfluton, kiun ŝi faris el volvita herbo. Ĉar la instrumentoj estis tiel malgrandaj, la aŭskultantaro devis sidi tre proksime, kaj tial biletoj estis malmultaj kaj karaj. Nur malfrue en ilia kariero la bestoĝardenestro faris por la feinoj scenejon el fonografo, kaj per la korno la sono plilaŭtiĝis. De tiu tempo konserviĝis fotoj, ankoraŭ vendataj en la bestoĝardenaj vendejoj. En la fotoj la feinoj havas tre delikatajn trajtojn — maldikajn nazojn, arkitajn brovojn, kaj orelojn kiel konketoj — kaj sulkojn ĉirkaŭ la buŝoj, kvazaŭ pro vivo de ridetado. Vela tenis siajn helajn harojn en nodo, kiel edzino; Vola lasis siajn nigrajn harojn fali kiel akvofalo de sur la ŝultroj. Ambaŭ portis robojn el ruĝa silko kaj aŭtunaj folioj. La feinoj vivis en vitra dometo en la bestoĝardeno, kaj ŝajne ne ĝenis ilin respondi petojn eĉ kiam ili banis sin. Ni preskaŭ ĉesis taksu la feinojn bestoj, ĉar ili flugis libere tra la urbo kaj vizitis la dancejojn, kaj la urbestro invitis ilin lanĉi novan ŝipon en la haveno. Ili eĉ verkis versojn, kaj kvankam la verkoj ne estis elstaraj, ili estis kompetentaj kaj niaj. La cetera mondo tamen ne aprezis la feinojn. Iliaj sondiskoj kaj fotoj kaj versoj vendiĝas nur en nia urbo — verdire, nur en la vendejoj de la bestoĝardeno.

Estis Vola, kiu mortis unue. Oni diris, ke ŝi estis venenita. Nigran tukon la bestoĝardenestro metis sur la vitran domon. Nur kelkajn tagojn poste mortis Vela. Lernejoj kaj dancejoj estis fermitaj dum semajno, kaj ŝipoj hisis nigrajn standardojn. La bestoĝardenestro aranĝis memorkoncerton, sed li mem estis tro trista por ĉeesti. Ĝis hodiaŭ nekonato metas florojn ĉiusemajne ĉe la tomboj de la feinoj — etaj kvadratoj ĉe la enirejo de la bestoĝardeno.

Nelonge post la morto de la feinoj estis skandalo en la bestoĝardeno. La dukapaj serpentoj venenis exploreman kaj elastan knabon, kiu rampis inter la barojn de la kaĝo. La patrino kriegis, kaj respondis deko da helpemuloj kun hakiloj. Per komuna forto ili sukcesis malfermi la pordon en la kaĝo, sed estis tro malfrue. Jam mordita estis la knabo, kaj kelkaj serpentoj fulmrapide eliris la kaĝon tra la malferma pordo. Rapide la serpentoj estis rekaptitaj, sed montriĝis al la spektantaro, ke ne temis pri veraj dukapaj serpentoj, sed nur unukapaj serpentoj kunligitaj per ŝnuro. La homamaso marŝis protestante al la bestoĝardenestro. Kun tremanta voĉo li klarigis, ke ĉiuj dukapaj serpentoj en la bestoĝardeno mortis pro malsano en la sama tempo, kiam mortis la feinoj Vela kaj Vola. La urbo jam estis en tia funebra humoro, kaj la bestoĝardenestro ne volis aldoni al la ŝanceliĝantaj animoj alian malfeliĉon. Tial li falsis dukapajn serpentojn el la lokaj unukapaj variantoj. La homamaso eligis larmojn pro la

karaj Vela kaj Vola, kaj la bestoĝardenestro publike pardonpetis. Novdungita psilo iom sukcesis repopularigi la serpentojn inter la vizitantoj, kaj la mordita knabo resaniĝis. Broŝuro kun la tuta historio estas aĉetebla en la bestoĝardenaj vendejoj.

De tempo al tempo fremduloj venas al nia bestoĝardeno kaj ne estas tiel ravitaj, kiel ni. Pri la fenikso kaj marvirino kaj baziliskoj kaj serpentoj la fremduloj havas nur malestimon; tamen la ŝafido-fruktojn ili ne povas tiel facile forklarigi, kaj ni ne eltenas fiajn onidirojn pri Vola kaj Vela. La fremduloj invitas nin al veraj bestoĝardenoj en Berlino aŭ Sandiego aŭ Moskvo aŭ Londono, kie estas enormaj bestoj kun dumetraj nazoj, kaj oranĝaj ĉevalsimiliaj bestoj kun kolo pli longa, ol la korpo, kaj nigreblankaj birdoj kiuj ne flugas aŭ manĝas insektojn, sed naĝas en akvo kaj vivas en fora lando, kie estas nur glacio. La fremduloj parolas ensorĉite pri siaj fantastikaj bestoj, kvazaŭ ili estus pli bonaj, ol la niaj. Finfine la fremduloj foriras, murmurante fivortojn pri niaj fuŝaj kredoj.

Sed nia bestoĝardeno ne devas bonvenigi fremdulojn por vivteni sin.

La Ondo de Esperanto de-
nove invitas ĉiujn deziran-
tojn partopreni en la inter-
nacia literatura konkurso
Liro.



Liro-2007 havas kvin
branĉojn:

1. **Originala prozo**
2. **Originala poezio**
3. **Traduka poezio:** Poemoj de Saŝa Ĉjornyj (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75a mortodato
4. **Traduka prozo (el la rusa):** *Аннекарпуа* de Anton Ĉeĥov
5. **Traduka prozo (el la angla):** *Eveline* de James Joyce (novelaro *Dubliners*)

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2007.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis 1 jan 2010 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2007*

Esperanto en muziko: ne nur en Esperantujo

La kvara parto

Gekaraj muzikŝatantoj, mi revenas al vi por malkovri novajn artistojn kaj projektojn, kiuj iamaniere rilatas al Esperanto. Dankon al Alano por la helpo! En la kvara parto de la muzika serio ni vojaĝos al Britio kaj Tuluzo kun Whity kaj lia *Esperanto Volumo 1*, al Cochabamba en Bolivio kun la knaboj de *Esperanto*, kaj al Portugalio/Brazilo kun Luanda Cozetti kaj *Couple Coffee*.

Whity. *Esperanto Volumo 1*

Whity originas el Tuluzo kaj loĝas nun en Nottingham en Britio. Li ekaktivis en 1997, li multe evoluis dank' al helpo kaj subteno de multaj artistoj de la hiphopa movado (*Kartel Omega*) kaj daŭrigis sola kiel perkuta kaj sincera repisto. Dank' al sia amo por la muziko, kaj precipe por hiphopo, li fariĝis grandulo en la hiphopa movado...

Whity estas repisto, kiu marŝas inter la montoj, kun la verbo, vervo kaj realo. La universo de Whity estas tia: senfina marŝo, lukto por rememorigi ke la Homo ekzistas, la espero, la forto, la ribelo, la rezisto, la pasio, ensorbitaj kaj de mordema kolero kaj de subtilo. Lia hiphopo reinstruas al ni la respekton de la momento, en sento kaj fluo...

La tekstoj de Whity distingiĝas pro pensoj humanismaj, kiuj eldiras la valorojn de la aŭtoro, en kiuj li kredas: amo, respekto kaj frateco... aspirante je la grandaj universalaj temoj de la vivo, kaj Whity atingas nin en nia pleja profundo... Whity rimarkiĝas ankaŭ pro sia fideleco al pure subgrunda muzik-movado, sen misvojiĝo, li faras



parton de tiu mita familio kiu ĉiam rigardas al horizonto, digne sed neeviteble, trafante la artiston kiu dormetas en ĉiu el ni. En lia hiphopo, lia flueco, lia frapa efiko al la kompreno, tiu ĉi batalo fariĝas nia. Ĝi iras en unu direkton, tiun de universaleco kaj de intimeco, sed kion aldoni al la beleco de la arta esprimado, krom la sento...

La unua projekto de Whity *Touch2style Vol. 1* aperis en 2001 kaj kunigis repistojn kaj DJ-ojn el inter Tuluzo, Parizo kaj Marsejlo. Tio estis la komenco de longa kariero kun pluraj aliaj projektoj, kiuj kolektiĝas per kunlaboro kun artistoj de la subgrunda hiphopa movado de Francio, Britio, Korsiko, Gvineo. Tiel aperis la diskoj *Ten on Ten* (en Britio 2004), *Touch2Style Vol. 2* (2006). Aliajn projektojn li disponigis senpage en la reto... Interalie, aperis *Esperanto Volumo 1*, kiu rapide elĉerpiĝis, kaj plej laste estis eldonita albumo *Poussieres d'etoiles* (Stelpolv-eroj), distribuata tra la reto de gazetvendistoj en la tuta Francio.

Whity malkovris Esperanton tute hazarde, serĉante titolon por sia nova koncepto de maxi-kodiskoj por reta distribuado. Li trovis jugoslavian poŝtmarkon de 1960 kun indiko *Esperanto*. En la reto li legis klarigojn pri Esperanto, kiu ŝajnis al li perfekta difino por la muzika projekto, ĉar por li muziko

signifas internacian lingvon por interŝanĝi universale... Whity ankoraŭ ne kantas en Esperanto, sed ĉefe en la franca, foje miksite kun la angla...

Aŭskulti lian hiphopon: <http://www.myspace.com/whityofficial>

Whity por la infanoj de la mondo

Krome Whity laboras jam dum unu jaro pri la projekto *Infanoj de la mondo* (Mômes du monde). Ĝi celas helpi kaj subteni la infanojn kaj lukti kontraŭ la malfeliĉo de infanoj en la mondo — lukti por la espero, kaj protesti kontraŭ la malegaleco. Whity verkis verve kaj vigle por la infanoj, kiuj suferas kaj kies koroj sangas pro manko de amo, de paco kaj libereco. Li elvokas la infanojn soldatojn, la infanojn kiuj suferas bombadojn de kruelaj kaj senutilaj militoj, infanojn viktimojn de gravaj malsanoj nekuraceblaj, infanojn kiuj suferas pro naturaj katastrofoj, infanojn kiujn senskrupulaj monaviduloj devigas prostituiĝi, infanojn kiuj de plej juna aĝo devas trude labori, infanojn kiuj mortas pro malsato, infanojn kiujn oni vendas, ktp....

Tiu ĉi verko por lanĉi alarmon al la homaj koroj estas mesaĝo kontraŭ la egoismo de ĉiuj, kiuj faras nenion por tiuj infanoj, kaj per tiu projekto li volas alporti iom da amo kaj subteno al ili... En la projekto partoprenas aliaj artistoj, kiuj jam kunlaboras kun Whity. La kolektita mono estos transdonita al asocioj kaj organizoj kiuj agas en tiu kampo. Inter la repaj titoloj estos interludoj soŭlaj, slamaj, jazaj, gospelaj ktp... La diskon akompanos DVD kun raportaĵo, videoklipo, galerio de grafikistoj, poetoj kaj fotistoj.

Laŭ li, Esperanto perfekte enkadrighas en la projekto pro la tutmondiĝo de la fenomeno, kaj li ŝatus havi partoprenon de Esperanto-artistoj (laŭeble, infano) por fari interludojn en Esperanto, kaj *Vinilkosmo* jam faris proponon al Karina, la filino de Ĵomart kaj Nataŝa. La diskoj (20 mil ekz-oj) estos disvendataj tra la reto de gazetvendistoj. Sciu pli: <http://www.myspace.com/momesdumonde>.





Esperanto pure poproka

Esperanton el la urbo Cochabamba en Bolivio konsistigas junuloj kiuj antaŭe estis en aliaj muzikgrupoj. Pop-roko estas la muzika stilo de tiuj ses knaboj, kies plej granda deziro estas fari muzikon kiun oni aŭskultos ne nur en Bolivio, sed ĉie trans la landlimojn. Gonzalo ludas gitaron, Mauricio drumas, Ricardo ludas akustikan gitaron, Gabriel basgitaras, Gustavo estas ĉe la sologitaro, kaj Rodrigo kantas.

Esperanto estas unu el la plej bonaj bandoj naskiĝintaj en la lastaj jaroj en Bolivio. En Cochabamba Esperanto prezentiĝis en diversaj ejoj kaj kluboj de la urbo. Nun (junio 2007) ili en La Paz prezentas la varb-disketon eldonitan ĉe *Ramhaus Records* kaj koncertas tiucele en la ĉefurbo.

Esperanto planas registri sian unuan plenan albumon tuj post reveno el tiu varbvojaĝo ĉi-somere, kaj poste ili vojaĝos al Meksiko. Ili kantas en la hispana kaj ni ankoraŭ ne sukcesis elscii, kial ili nomas sin Esperanto.

Aŭskultu: <http://www.myspace.com/esperantobolivia>

Luanda Cozetti kaj Couple Coffee



Eble vi memoras en *Vinilkosmo-kompil' Vol. 2* (1996) kanton de Caetano Veloso *Mia bon', mia malbon'* interpretitan de Luanda Cozetti el Rio-de-Ĵanejro kun muzikaranĝoj kaj adapto en Esperanto de Flávio Fonseca el Brazilio. Post dek jaroj Luanda Cozetti reaperas en Portugalio kun la nova bando *Couple Coffee*.

Couple Coffee unue estas muzika geedziĝo inter Luanda Cozetti kaj Norton Daiello. Ŝi faras ĉion per la voĉo.

Kaj li kantigas sian basgitaron. Ambaŭ venis el Brazilo al Portugalio. El tiu kuniĝo naskiĝis miriga muziko, originala kaj rafinita. Tiu alĥemio allogas la publikon.

Couple Coffee malkovriĝis en tiu duopa formo en 2005 tra la disko *Puro*. Poste la duopo kreskis al kvaropo kaj prezentis novan albumon *Co'as Tam-anquinhas do Zeca!* surbaze de la verko de la portugala aŭtoro José Alfonso.

Couple Coffee nun konsistas el Luanda Cozetti (kantado), Norton Daiello (baso), Sérgio Zurawski (gitaro), kaj Ruca Rebordão (perkutiloj).

Tiu albumo estas vojaĝo en la poezia kaj muzika universo de Zeca, en kiu *Couple Coffee & Bando* uzas sinceran lingvaĵon per sonoj ligitaj al Bosa novo, Brazila popola muziko kaj jazzo. Ĝi estas omaĝo al Zeca Alfonso, liaj vortoj kaj melodioj interpretitaj kun karismo kaj spriteco de Luanda Cozetti trafe plenumiĝas.



Fotis Manuel Luis Cochofel

Kaj Esperanto? Kvankam ŝi kantas en la portugala, Luanda scias, ke ŝi kontribuas al Esperanto, ĉar ŝia avo parolis Esperanton. Ŝi plu pensas pri tio kaj ŝatas la ideon pri tiu lingvo por la homaro... Do ne maleblas ke estonte ŝi denove kantas en Esperanto.

En la miaspac-paĝo de *Couple Coffee* estas, interalie, Esperanto-kanzono; la sesa kanzone en la verda radiaparato sub la titolo "Special Participations". *Mia bon', mia malbon'* de la brazila komponisto Caetano Veloso, versio de Flávio Fonseca: <http://www.myspace.com/couplecoffee>

Novajoj el la miaspac-mondo

Pliaj Esperantaj artistoj aldoniĝis ĉe Miaspaco kaj indas ilin viziti kaj mal-kovri:

<http://www.myspace.com/laperdita-generacio>

<http://www.myspace.com/lapafklik>

<http://www.myspace.com/kore49>

<http://www.myspace.com/bandamerlin>

<http://www.myspace.com/rogerborges>

Kompilis kaj miaspacumis por vi

Flo!

Bona memoro por amikoj

Figiera, Gian Carlo. *La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka*. — 2a eld. — UEA, Rotterdam, 2006, — 32 pĝ., il.

Ada Sikorska-Fighiera (1929–1996) iĝis konata en la Esperantomovado kiel redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, tasko, kiun ŝi plenumis kun ama sindediĉo dum 35 jaroj.

Verki recenzon pri la libreto samtempe estas komplike kaj simple. Komplike, ĉar legi pri la lastaj tagoj de ĉiu homo estas triste, ĉagrene kaj kordolore. Simple, ĉar Gian Carlo (la edzo de Ada) por mildigi la lastajn tagojn de sia edzino uzis neordinaran manieron: li enhospitaligis ŝin en privatatan klinikon. En ĝi Ada ricevis propran ĉambron kun banejo. La ĉambro disponis pri modulebla klimato, tele-reguleblaj radio kaj kolor-televideo, telefono, mult-provianta glaci-ŝranko, ortopedia lito kies kliniĝon la paciento povis laŭvole mem modifi per ĉemana klavo, apuda sonorilo por alvoki flegistinon kaj aldona sofo-lito. La manĝoj estis elekteleblaj el longa menuo, kun mencio, ke ankaŭ aliaj pladoj estis kuirotaj laŭ dezir-esprimo. La asekur-kompanio ricevis la necesajn kuracistajn atestaĵojn kaj akceptis transpreni ĉiujn kostojn.

Ankaŭ la edzo uzis por la bono de la malsanulino etan malveron. Li (kaj laŭ la interkonsento ankaŭ la personaro) konstante diris al Ada ke ŝi resaniĝos. Supozeblas, ke Ada konjektis pri sia sorto. Ŝi mortis dormante, do ŝi mortis bele.

Post la morto de Ada dum semajnoj alfluadis kondolencaj mesaĝoj de la esperantistoj el la tuta mondo — entute preskaŭ 200, nun gardataj en du grandaj albumoj.

Gian Carlo Figiera opinias, ke apero de la libreto estas bona memoro por amikoj de Ada. Mi opinias, ke la plej bona memorago estus abonado al *Heroldo de Esperanto* redaktata de Ada dum 35 jaroj.

Anatolo Sidorov

Rusa Novelaro

La 19^a jarcento

Puŝkin Lermontov Gogol
Dostojevskij Saltykov-Ŝĉedrin
Turgenev Tolstoj Ĉeĥov

Petu ĉe via libroservo

Prezo: 30 eŭroj

Modesta plia ŝtupo

Dall'Olio, Anna Maria. *Tabelo: Unuakta teatraĵo en 19 scenoj / Enkond. Gianni Cascone. — Pisa: Edistudio, 2006. — 63 pĝ.*

Laŭ la informoj kiujn mi disponas, *Tabelo* estas la unua publikigita verko en esperanto fare de Anna Maria Dall'Olio (Italujo, 1959). Ĉi unuakta teatraĵo en dek naŭ scenoj jam premiĝis nacilingve, en sia itala varianto. Per teatreco konscie simbola, absurda kaj ekzistisma, kun plenmano da roluloj kaj sen ŝanĝo de scenejo, *Tabelo* prezentas la akcepton de novdungito fare de la kvar geoficistoj de entrepreno; ĉu tiu ĉi simbolas la socion, la homaron aŭ ion alian, ne restis al mi klare post la legado. Jen diversaj temoj en la verko: amo kaj sekso (per kisoj frenezaj, pasiaj); rilatoj inter viroj kaj virinoj; soleco inter homoj; la pluraj identecoj kaj roloj de ĉiu unuopulo.

La iom troiga, ŝablona kaj rutine tradukita *Enkonduko* komparas la agojon kun ŝaktabulo. Verŝajne la titolo devus do esti ne *Tabelo* sed *Tabulo*. Fakte, pro tiu kaj aliaj detaletoj, la verko lasas impreson ne de originalo sed de traduko, kun italismoj kiel *doto*, *telefoneto*, *kompetenta* aŭ *estimo* anstataŭ respektive *talento*, *poŝtelefono*, *juĝorajta* kaj *taksado*, kaj rebusoj kiel *ŝtala makzelo*.

Temas pri unuaktaĵo ne aparte interesa aŭ elstara el la vidpunktoj ne nur lingva kaj stila sed ankaŭ enhava. Persone mi preferus legi tradukojn de, ekzemple, *Marato/Sado* de Peter Weiss, *La kaprino, aŭ Kiu estas Silvia?* de Edward Albee kaj similaĵojn daŭre aktualajn kaj pensigajn. Aŭ, en Esperantujo, teatraĵojn de Paul Gubbins. Sed ni ne tro severu: *Tabelo* estas respektinda plia ŝtupo sur la modesta ŝtuparo de la esperanta teatro.

Jorge Camacho

“Pola Esperantisto” ĉesos

Per ĉiuj miaj fortoj (kaj ankaŭ la mono) mi faris por tio [por la movado. — la red.] ĉion eblan (kaj eĉ pli), laborante malgraŭ diversaj obstakloj kaj personaj malhelpoj kaj akuzoj. Ne miru, do, karaj Legantoj, ke ne vidante la bonan volon de decidantoj rilate al helpo, kunlaboro, respekto, mi decidis:

1. rezigni pri plua aparteno al PEA,
2. ĉes[ig]i la eldonadon de *Pola Esperantisto* komence de la venonta jaro.

Kazimierz Leja

(*Pola Esperantisto*, 2007, №3)

Pli kaj pli, aŭ Pli ol nenio: nova disko de Martin Wiese

Martin & la talpoj. *Pli ol nenio*: KD. — Donneville: Vinilkosmo, 2007.

Jen estas longe atendita kreaĵo de la ĉefvoĉo de la konatega sveda rokbando *Persone*, Martin Wiese. *Vinilkosmo* ĉi-februare publikigis 12-kanzonan albumon *Pli ol nenio* kun liaj muziko kaj kantotekstoj kaj aldonaj samdiskaj videoj kun du intervjuoj kaj mp3-a okminuta “remikso” far DJ Roĝer Borĝes de unu el la kanzonoj.

Kiel mem Martin diras, la albumo estas kvazaŭ memorigo ke li ne malaperis post la disfalo de *Persone*. Ĝi konsistas el registraĵoj faritaj de li “dum liberaj tempetoj” en 2005 kaj 2006, finpretigitaj ĉe *Vinilkosmo* kun helpo de amikoj, la “talpoj”. La sonojn akompanas bela grafika aranĝo (desegnita de la aŭtoro mem kaj kun fotoĵoj de lia familiano Asa), ilustranta same kiel la kanzonoj, vojaĝon tra spaco, humoroj kaj vivhistorioj, vivdemonstradoj, vivproblemoj, serĉoj de amo.



La Martina voĉo sonas tutece, bele, jen leĝere, jen streĉe, libere kaj eĉ, mi diru, senzorge — ke vi emas kredi al li. Kio ĉiam gravas en kantado, estas bona artikulacio, kion Martin faras preskaŭ senriproĉe. La entonigo kaj esprimivo estas idealaj. Aŭdeble li simple ĝuis kanti kaj ludi. Precipe ĝojigas la profesiega gitarado, aŭdate kaj spektate en la videoj. Ofte la kantado impresas per multvoĉeco kaj eksterordinaraj harmonioj kaj melodioj, la transiroj inter la maĵoraj kaj minoraj kaj komplikaj akordoj. La stilo varias, sed ne vaste ja la ĝenro diktas siajn limigojn — de melodiaj rokaj jen baladoj, jen energiaj, rapidaj aŭ ne tre, reliefaj elektraj pezaj ritmoj, preskaŭ grunĝaj, inter akustikaj kvazaŭ intence minimumecaj aranĝoj. Iam mi klare aŭdas aldonajn instrumentojn de orkestrado ... en mia propra kapo, ekzemple en *Anstataŭ letero*, aŭ en *La gusto*

kaj la son'. La varieco bone manifestiĝas en skaloj de laŭteco, rapideco kaj energieco de la kantoj. Kiel li mem diras, li plezure revenis al elektra sono post la lastaj akustikaj albumoj de la ne-plu-a *Persone*.

En bona rok-muziko la tekstoj estas ĝuste portantoj de la ĉefa pezo, aŭ almenaŭ ne malgravas. Martin atingas la celon. Li jen kontemplas la nordan naturon en la eka enkondukaĵo *Novembro* kie ni aŭdas ke li “malcertas pri ĉio”, “sed mi venos, se vi venos / mi dependas de vi...” La pluaj kanzonoj estas vojaĝo ankaŭ en tempo, kaj li penas trovi kontinuecon inter si la antaŭa kaj la nuna, per simplaj sentoj de atendoj, senpacienco, strebo senti familiecon, aliĝo al io grava pri kio oni revas. Li esploras rakontante kiel seniĝi de korrompito en la albumtitola *Pli ol nenio*, penas trovi sinidentigon en ĉi dinamika mondo en *Ĉiuj en la Mondo*, demandas ĉu nur en songoj povas esti “rilatoj sen ŝajn” kaj “malgajn” — en malĝoja rakonto pri sinmortiginta knabino (*Rebeka*). Kio estas beleco/malbeleco (ĉu ĝi povas esti en malpuro?), ĉu oni sopiru al iu pli (*La gusto kaj la son'*)? Li rakontas ke li “ne vivas tie ĉi”, sed “nur ekzistas” kaj “malrapide dronas en la lakto kaj miel” kaj denove demandas ĉu “homoj kiel mi” estas sentaŭguloj, klaŭnoj, nuloj, strangaj buboj, homaj ruboj...

Tamen mi ne povis trovi unuecon de la koncepto — ĉiuj temoj, demandoj, impresoj kaj humoroj estas tiom variaj, kvazaŭ fluo de la konscio. Laŭgrade min penetras liaj insistoj de provoj penetri ion gravan, esencan por interhomaj rilatoj: “en la granda enu’ / kion faru ni? / Mi deziras vin plu ĉiam pli kaj pli” (*Pli kaj pli*).

Oni povas kredi aŭ ne kredi al Martin, kaj ĝuste de tia elekto/decido dependas la preteco de la aŭskultanto kompreni kaj akcepti ĉi senkontesteble brilan muzikaĵon. Kaj kvankam mi iam petole sentis ke oni povus senprobleme kvazaŭ ŝanĝi la melodiojn de la kanzonoj kun la aliaj de la albumo por ke la fina rezulto estu almenaŭ simila, mi esperas ke la aŭtoro havis pli da integreco en sia intenco. Mi esperas, ke mi aŭskultos pli kaj pli, kaj ke ĉio stariĝos en siajn lokojn, ĉar ne eblas ne fidi al Martin, do emi aŭskulti pli kaj pli ĝis aperas pli da kompreno kaj intimiĝo al lia, do — nia, Mondo.

Andrej Peĉonkin

Literatura konkurso EKRA-2007

La rezultoj de la Internacia Literatura Konkurso EKRA-2007, organizita de la Esperantista Domo de Kulturo *D-ro Ivan Kirčev* (Razgrado, Bulgario) sub la aŭspicio de *Literatura Foiro*:

Poezio

Unua premio: Jaroslav Krolupper (Ĉeĥio)

Duaj premioj: Christian Rivière (Francio), Elena Popova (Bulgario), Nikolaj Neĉajev (Ruslando)

Triaj premioj: Christian Rivière (Francio), Danĉo Danĉev (Bulgario), Dimitrije Janičić (Serbio), Radka Bojaĝieva (Bulgario)

Aljuĝitaj honoraj mencioj al kvin aŭtoroj el Mongolio, Usono kaj Bulgario.

Humuro

Unua premio: Leif Nordenstorm (Svedio)

Dua premio: Zorka Vinceljak (Kroatio)

Aljuĝita honora mencio al unu aŭtoro el Rumanio.

Ĵurio: Ljubomir Trifonĉovski (prezidanto), Mariana Evlogieva, Ivaniĉka Maĝarova.

Premiitaj verkoj aperos en *Literatura Foiro* kaj en *Esperantista Tribuno*.

HeKo

La Verko de la Jaro 2006

La libro de Spomenka Ŝtimec *Hodler en Mostar* gajnis la internacian PEN-premion *La Verko de la Jaro* por 2006, rezervitan al prozo. *Hodler en Mostar* estis selektita de la membroj de la Esperanta PEN-Centro kune kun kvin aliaj titoloj: la laŭron atribuis la abonantaro de *Literatura Foiro*, per referendumo.

“Mi celis beletre viviĝi unu el la modelinoj de Ferdinand Hodler por stimuli legantojn interesiĝi pri la realaj Hodler patro kaj Hodler filo. Atentigi ke en Sarajevo, la urbo kiu ege suferis, troviĝas io rilatanta al nia esperanto-kulturo”, — klarigis la aŭtorino pri sia 100-paĝa biografia romaneto.

Spomenka Ŝtimec gajnas unuafoje la Verkon de la Jaro, kaj estas eĉ la unua artistino kiu atingas ĝin (sola virino kontraŭ kvar viroj, ĉi-jare).

Sekretario de la Premio estas c-ino Milena Makaveeva.

HeKo

Ricevitaj libroj

Dall’Olio, Anna Maria. *Tabelo*: Unuakta teatraĵo en 19 scenoj / Endkond. Gianne Cascone. — Pisa: Edistudio, 2006. — 64 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Eiade, Mircea. *Ekzile*: Du noveloj / Trad. el la rum., antaŭpar. Ionel Oneț. — Thaumiers: La KancerKliniko, 2006. — 19 pĝ. — (La KromKancerKliniko, №21). — [Donaco de LKK].

Fighiera, Gian Carlo. *La lastaj tagoj de Ada, Aduška*. — 2a eld. — Rotterdam: UEA, 2006. — 32 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Komuna Eŭropa Referenckadro, La: Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj / Red. Katalin Kováts; Trad. el la angla Roel Haveman, Katalin Kováts, István Ertl. — Rotterdam: UEA, 2007. — 24 pĝ. — [Donaco de UEA].

Tacuo Huĝimoto. *Esperanto tiel parolata*: Interparola praktiko de Esperanto. — Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 2006. — 127 pĝ., il. — [Donaco de KLEG].

Vlasova, Irina. *Eringio — herbo vagabonda*: Novelo / Komp., antaŭpar. Valerij Sipoviĉ; Trad. el la rusa Svetlana Smetanina. — M.: Impeto, 2006. — 280 pĝ., il.; 300 ekz. — [Aĉeto].

Сорос, Тивадар. *Маскарад*: Игра в прятки со смертью в нацистской Венгрии / Пер. с англ. Владимира Бабкова. — М.: Рудомино, 2001. — 248 с., илл.; 3000 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanto en Azio. 2007/56; Esperanto en Danio. 2007/2; Esperanto. 2007/6; Ĝenerala Informilo. 2007/143; Heroldo de Esperanto. 2007/6,7; Kontakto. 2007/2; La KancerKliniko. 2007/122; La Revuo Orienta. 2007/5; La Sago. 2007/35,36; Monato. 2007/6; Norvega Esperantisto. 2007/3; Pola Esperantisto. 2007/3; REGo. 2007/3; Scienco kaj Kulturo. 2007/3; Sennaciulo. 2007/1,2,3,4; Service de Presse. 2007/35,36.

Literatura Foiro. 2006, №226

La 226a *Literatura Foiro* (aprilo 2007) daŭrigas sian kontribuon al la Goldoni-jaro per la unua akto de *La ruza vidvino*, tradukita de Perla Martinelli. La itala literaturo gastas ankaŭ per la prezento de du libroj, recenze de Carlo Minnaja: *La Malemuloj* de Giovanni Verga kaj *Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj* de Sen Rodin.

Lingvistiko, interlingvistiko kaj filologio okupas multajn paĝojn. Andreas Künzli recenzas la libron *En la serĉado de la mondlingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj* de Aleksandr Duliĉenko. Gbeglo Koffi, Leen Deij kaj Bertil Nilsson reagas al la klarigo de Perla Martinelli, kial ŝi ne voĉdonis por la 9a Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (LF 225). Geraldo Mattos komentarias la kontribuon de Sigurdur H. Pétursson (LF 224) kadre de la semantika debato, ekinta en LF 220. Claude Gacond daŭrigas sian esploron pri la vivo kaj didaktika kontribuo de “markizo” Louis de Beaufort.

Giorgio Silfer konfrontigas la filmojn *La interpretistino* de Sydney Pollack kaj *La tradukistino* de Elena Hazanov: unika komparo ĝis nun mankanta en la panoramo de la kinkritiko. Daniel Mrázek vervigas la muzikan rubrikon parolante pri la kompaktdisko de *Supernova*.

Originala poezio ĉeestas per liriko de Gian F. Giorgi kaj versaĵoj de Fra Gaeta. La apero de reeldonoj de *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker kaj *La Zamenhof-strato* donas al Mariana Evlogieva, respektive al Vinco Ošlak, la ŝancon por recenzi kaj filozofi, same kiel meditas Radosław Nowakowski pri konsumado kaj produktado.

HeKo



Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDIFERENCA

La mondo iĝas por vi malpli kosta!

Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon **MONATO** dum 3 monatoj senpage.

Por pliaj informoj kaj kondiĉoj vizitu:
www.monato.net


aŭ skribu al **MONATO**
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140
B-2000 ANTWERPEN, BELGIO

FAKSE: +32 3 233 54 33
RETE: MONATO@FEL.ESPERANTO.BE

Por la aprila *Magia kvadrato*, kompilita de Viktor Alikin, venis 10 respondoj, ĉiuj estas ĝustaj. Ilin sendis: Edson Corra Capucci (Brazilo); Anne George, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio); Erkki Kempainen, Bruno Lehtinen (Finnlando); Breandán Ó Mearáin (Norda Irlando); Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando); Edith Schöwälder (Hispanio).

Loto donis premion al **Edson Capucci**. Ni gratulas!
La ĝusta respondo: *Nokte eĉ monstro estas belulo.*

Krucvortenigmo



Horizontale: 1. Lando, kie okazis la 73a UK (R); 5. Lando, kie okazis la 77a UK (R); 6. Ĉeesti por helpi al iu pro ofica devo; 9. Morti, neniigi (R); 10. = Muŝbirdo; 11. Stako da papero (R); 15. Ĉefurbo de Turkio (R); 16. Ĉiu el la 12 partoj laŭ kiuj oni dividas la jaron (R); 18. = Alikauze; 19. Lando en Skandinavio (R); 20. = Kankro (R); 24. Fakultatestro (R); 25. Arbo-speco; 26. Ĝi plektas reton (R); 27. Mezuro de longeco (R); 28. Monto, loĝloko de la Muzoj; 31. Malgranda saltanta besteto el la klaso de amfibioj; 34. = Boatkonkurso (R); 35. = Parcelo; 36. = Volframo.

Vertikale: 1. Fiŝkaptilo; 2. = Pikilo; 3. Korta birdo (R); 4. = Dekonaĵo (R); 5. Kontinento; 7. = Stelanizo; 8. Ĉasema rabobesto, kiu dumnokte terure kaj timige blekas; 9. Kemia elemento Pr (R); 12. Kemia elemento Mo; 13. Parto de regno (R); 14. Aro da kameloj, transportantaj komercaĵojn (R); 16. Profunde kaj daŭre pensi (R); 17. Taskaro por taksi kapablo(j)n; 21. Ne interna (R); 22. Salti en akvon (R); 23. Hundo-simila rabobesto; 29. = Palpilo (R); 30. Obelisko, monumento (R); 32. Mineralo (R); 33. Mona unuo de Meksiko.

La solvoj venu al la redakcio antaŭ la 1a de septembro.

Kompilis **Viktor Alikin**

Ridu kun ĥoloj

- Eva, post la litro da vodko vi estas bela knabino!
- Johano, ĉu vi freneziĝis! Mi estas Adamo!

Priskribo de vira mateno: “Mi vekiĝas, ellitiĝas, matenmanĝas kaj poste mi veturas hejmen”.

18-jariĝon oni festas unufoje dum la vivo, sed 81-jariĝon eĉ pli malofte.

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Ni fosu nian truon

Ĉiu klopu du fari sian kontraŭaĵon, ne malpli ol oni povas, kiel prave diras Renato. (José Antonio Vergara, 22 maj 2007, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3224>)

Senfrotaj batalantoj

... kunfrotado de manoj ne estas raŭmisma, sed finvenkisma kutimo. (Artikolo *Heroldo de Esperanto*, sen dato kaj sen aŭtoro, <http://www.esperantio.net/index.php?id=34>)

Suntaksa sintakso

Entuziasmigaj novaĵoj ne tiom abundas, ni ne suntaksu ilin! (Claude Nourmont, 11 maj 2007, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3170>)

La ardan amon trans ĉemizo... sed sen recenzo

Titolo: Polo-ĉemizo. Eldoninto: Peter Weide. Klarigoj: Mez-verda ĉemizo kun mallongaj manikoj; fronte maldekstre la surskribo “esperanto lingvo internacia”... Recenzoj mankas. (<http://katalogo.uea.org/?inf=7803>)

Popolo en la subkonscio

Ĉiuj esperantlingvanoj estas parto de la esperanta popolo, eĉ se ili ne konscias pri tio. (“Historiaj analogioj por la afrika Esperantio”, HeKo 331 8-A, 13 jun 2007, <http://www.esperantio.net/index.php?id=351>)

Kontraŭ likoj ĉe la supro?

El la konkluda raporto de la elekta komisiono de UEA... Ranieri Clerici (...plivastigo de la tegmenta funkcio de UEA, ktp) (11 jun 2007, <http://www.liberafolio.org/2007/elektorekomendo>)

Malvivaj animoj?

El la enhavtabelo: p. 142. Forpasoj. Kio estas OSIEK? (*Esperanto*, 2007, №6, p. 122)

Ne malviva bonanimo

Aliflanke, la hispana agentejo EFE raportis ke Fidel dialogis bonanime pri la vizito de la ĝenerala sekretario de la komunista partio de Vjetnamio... (dissendolisto esperanto05@ain.cu, 6 jun 2007)

Verdiĝu kalsonetoj, aŭ: Movadu senkonstipe

Do, fekiĝu kamaradoj kaj ekagu pli aktive. (Vladimir Bepalov, 18 apr 2007, <http://groups.yahoo.com/group/reu-agado/message/5170>; rimarkis Kalle Kniivilä)

Plukis **István Ertl**

Mi kuŝas surlite, mi legas gazeton, per unu okulo mi spektas matĉon, mi trinkas bieron, mi manĝetas sandviĉon, kaj per unu piedo mi karesas hundon. Subite eniras en la ĉambron la edzino kaj krias, ke mi tamen nenion faras!

- Al kio vi atentis prenante buteron por via familio?
- Al kameraoj kaj gardistoj.

- Andreo antaŭhierau ĉesis drinki.
- De kiu vi scias tion?
- Nu..... mi legis. Ĉi tie pendas nekrologo.

Tradukis esperantistoj el Olsztyn (Pollando)



15-jara ruslanda esperantistino Eva (vidu sur la foto) deziras trovi geamikojn en la tuta mondo. Interesoj: naĝado, fotado, literaturo, internacia kuirarto, interkultura komunikado. Posedas ankaŭ la anglan lingvon.

Eva Ionesova ✉ ul. Sernovodskaja 140, RU-443044 Samara, Ruslando. 📧 evaionesova@mail.ru

Se via Esperanto-societo ne posedas la kvar librojn de O. M. Aĭvanhov (*Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga — La joko de nutrado — Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko — Sub la regno de la kolombo: paco regu*), petu ilin kaj vi ricevos ilin senpage de eldonejo **Prosveta**:

✉ CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando.

La 21an de majo en Hamburgo en la internacia kvarlingva familio de Aleksandr Galkin kaj Irina Benke naskiĝis la unua filo, **Kirill**.

Ni gratulas kaj bondeziras!

Lastminute

La Kongresa Sezono. La 92^a Universala Kongreso en Jokohamo estos la plej amasa esperantista aranĝo ĉi-somere kun 1753 aliĝintoj el 58 landoj. La 63^a Internacia Junulara Kongreso en Hanojo dume altiris 170 aliĝintojn. 214 personoj aliĝis al la 7^a kongreso de la EEU en Maribor (Slovenio), 199 al la 18^a Ekumena Esperanto-Kongreso en Pelplin (Pollando). Ilin nombre superas la 42^a Brazila Kongreso de Esperanto en Rio-de-Ĵaneiro kun 341 aliĝintoj. **(HaGo)**

Elekto sen elekto, sed kun konflikto. La kandidatigo de Marija Beloŝević kiel estrarano de UEA, farita de la Elekta Komisiono (vd. pĝ. 4) kaŭzis protestojn de la Kroata Esperanto-Ligo, en kiu Beloŝević ne membras, gvidante alternativan Unuiĝon. Kelkaj internacie konataj kroataj aktivuloj minacis ekŝiĝi el UEA, se Beloŝević estos elektita. Oni forte kritikis ankaŭ la Elektan Regularon en UEA. **(AlKo)**

Novtipaj ekzamenoj preparataj. Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI ellaboras novan ekzamensistemon, kiu ebligas al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksi lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado. **(GK UEA)**

FOTORAPORTOJ



ZEO. 2 jun 2007 en ĉeesto de centoj da esperantistoj la urbestro de Bulonjo-ĉe-Marzo inaŭguris la renovigitan placon antaŭ la stacidomo, ĉe kiu Zamenhof eltraĵniĝis en 1905. La busto de Zamenhof staras antaŭ la enirejo. *(Saliko / F. Valet)*



Ĉinio. 19 maj komenciĝis en la sidejo de la Kantona Esperanto-Asocio Esperanto-kurso prepare al la Ĉina Esperanto-kongreso (Kantono, oktobro 2007). La kurson, gvidatan de Augusto Casquero, partoprenas, interalie, studentoj de la Universitato pri Televido kaj Radio. *(Augusto Casquero)*



Junularo. Grupo da gejunuloj el Pollando, Ruslando, Brazilo kaj Svedio dum la tradicia renkontiĝo HELA en la nord-pollanda duoninsulo Hel, organizita de *Varsovia Vento*, havis sufiĉe da tempo en la kunvenejo, sur la plaĝo, kaj en restoracio por interkonatiĝi, praktiki la lingvon kaj senstreĉe pasigi la unuan majan semajnon. *(Aleksiej Korĵenkov)*



Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Festoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricev-itajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

La supra foto de Maurizio Bresnik estis laŭde menciita pastin-jare.